Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
**Jarkolekto 27** — trimonata — ISSN 1013-2031 **4/97**

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

## Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

**Redaktoro:** Jozefo NÉMETH

**Vicredaktoro:** Katalin SMIDÉLIUSZ

**Kunlaborantoj:** Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Françoise NOIREAU, Atilio ORELLANA ROJAS kaj Franz-Georg RÖSSLER

**Respondeca eldonanto (verantw. uitgever):** R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

**IPR**

**Redaktejo:** NÉMETH József
HU-8500 PÁPA, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836, 💻 nlalt@konyvtar.c3.hu

**Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

## Enhavo


*Novaj honoraj membroj de ILEI* ..... 1
Renée Triolle: *Kolokvo pri la propedeŭtika valoro de E-o dum UK* ..... 3
Renato Corsetti: *Propede...kio?* ..... 5
*El la landoj kaj sekcioj* (AL, AU, BE, BR, FI, DE, ES, IR, IT, YU, HR, RO, RU, US, ZR) .... 8
Yamaguti Sin'iti: *Mia provo instrui E-on al mia filo* ..... 20
Yamasaki Seikô: *Pri ekzamenoj de UEA/ILEI* ..... 23
*Reagoj* (Hans ten Hagen, Blazio Vaha) ..... 25
*Por via notlibro* ..... 26
Konkurso kiu invadas Esperantujon (Géza Kurucz) ..... 26
Konkurso de infandesegnaĵoj (alvoko) ..... 28
Modela Esperanto-parolo, honore al Ivo Lapenna(alvoko) ..... 29
Granda ŝanco por Esperanto dum prestiĝa lingvistika konferenco (K. S.) ..... 31
*Aliĝilo de ILEI-Konferenco en Montpellier* ..... 33
*Financa raporto de ILEI por la jaro 1996, financa plano por 1998* (B. A.) ..... 35


## Estraro de la Ligo


**Prezidanto:** d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5465. Rete: charters@prin.edu. *Kunordigo, instruista trejnado.*

**Vicprezidanto**: Brunetto Casini, Casella Postale 213, IT-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85. Rete: edistudio@sirius.pisa.it *Planado.*

**Sekretario:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 37 45 052. Rete: marija.belosevic@public.srce.hr. *Landaj sekcioj, membro-varbado, rilatoj kun UEA kaj la movado, servoj al instruistoj.*

**Kasisto:** Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

**Vic-sekretario:** Prof. Zhang Danchen, North Area 14-dong, 34-hao, Huazhong Normal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. Internet: dedhea@public.wh.hb.cn *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

**Membro**: Mag. Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. Tel. kaj fakso +54-51-520065. *Konferencoj, ekzamenoj.*

**Membro**: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende, Belgio, Tel. (32 59) 502708. *Eksteraj rilatoj.*

**Estrara komisiito:** Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. Rete: rglosso@siue.edu *Instruado de infanoj.*

**Estrara komisiito:** Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI.*

**Estrara komisiito:** Stefan MacGill, Fácán köz 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. Tel. (36 23) 363-280. *Eldonado*

**Observanto** (UEA): Renée Triolle, 4 impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio


## NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE ILEI

**Idyss Einihovici** - naskita en Varsovio, februare, 1904 - ĉiam aktivis. Ŝajne ŝi eĉ forkuris plurfoje de la hejmo speciale kiam la patro deziris aranĝi por ŝi edziniĝon! Ŝi renkontis kaj edziniĝis kun sia edzo en Milano, Italio en julio 1934 post nur trisemajna interkonatiĝo. Ŝi estis revenanta post ferio en Palestinio kaj vizitis sian fraton, je tiu tempo loĝantan en Milano. Li konis s-ron Einihovici kaj prezentis ilin unu al la alia. Ili venis Aŭstralion en 1939, ĵus antaŭ la deklaracio de la milito kaj ili loĝis en tre malgranda urbo en la tiel nomata "tritiko-zono", Corregin, kie s-ro E., mirinda kaj afabla viro, laboris profesie kiel kuracisto, dentisto kaj veterinaro. Ili loĝis tie dum la milito kaj translokiĝis al Perto en 1945. Ambaŭ dediĉitaj e-istoj, s-ro E. instruis E-on ĉe kolegio por trejnado de instruistoj, Ledlands Teachers College kaj ambaŭ partoprenis ĉiun UK ĝis lia morto 1988. Idyss daŭre ĉeestis kongresojn ĝis 1997. Ŝi ne ĉeestis en Adelaide. Ŝi daŭre reklamas en ĵurnaloj, ricevas plurajn respondojn kaj ofte instruas dum horoj telefone. Ŝi daŭre skribas al la ŝtata registaro de Okcidenta Aŭstralio, klopodante konvinki ĝin enkonduki E-on en unuagradaj lernejoj. Ŝi iniciatis la postenon de Trevor Steele ĉe Montessori-lernejoj en Perto, provizante ankaŭ apartamenton kaj aŭton. Ŝi mem provizis financrimedojn por diversaj projektoj, ekz. sendante delegitojn al kongresoj, juna knabo akompanita de sia patrino ĉeestis la Infanan Kongreseton en Prago kaj ĉi-jare ŝi pagis vojaĝkostojn de instruistino kaj esplorstudentino de universitato por ke ili partoprenu UK en Adelaide. Ŝi estas tre forta individuo kun propraj ideoj, pro kio ŝi neniam konformas al iu ajn organizaĵo. Nome de sia edzo, Idyss fondis fonduson por junulvojaĝado kaj antaŭ nelonge sianome fonduson por infanoj.




Ŝi nun havas 93 jarojn kaj, kiel ĉiam, estas tre pozitiva kaj optimisma persono. Ŝi ne scias pri la signifo de malsukceso kaj la vortoj "ne povas" ne troviĝas en ŝia vortstoko. Ŝi vere estas inspira persono. Por fini, ŝi parolas naŭ diversajn lingvojn, pro kio E-o ne estas bezono sed filozofio. ***Laura Raiter***

**Charlotte Kohrs**. Ekde ŝia diplomiĝo ĉe *Mills College* en 1930, la vivo de Charlotte Kohrs centriĝis je infanoj. Ĝis sia emeritiĝo ŝi helpis al geknaboj en publikaj lernejoj plibonigi sian kapablon pri legado kaj parolado per metodo kiun ŝi nomis "desegnado kaj parolado". Poste ŝi daŭrigis tiun laboron kiel volontulo. En 1983, ŝokita de la morto de sia edzo kaj vera amiko de 44 jaroj, s-ino Kohrs respondis al radio-programo pri E-o; kaj tiel komenciĝis ŝia esperantistiĝo. Instruante kaj reklamante la internacian lingvon, ŝi trovis multajn

amikojn en pli ol 40 landoj. En 1987 ŝi kaj ok el tiuj amikoj starigis senprofitcelan organizaĵon *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo* (IĈLM), kiu celas uzi E-on kiel ponton inter infanoj vastmonde. Tiurilate ŝi skribis "Kune, ni kaj la infanoj, vekos la mondon!"

Inter 1987 kaj 1991 IĈLM publikigis kvin eldonojn de 8-paĝa *Revuo*, kaj de tiam ĝis oktobro 1993, s-ino Kohrs helpis al instruistoj de la 5-a kaj 6-a gradoj ĉe la elementa lernejo *Freese* en *San Diego* (suda Kalifornio) instrui E-on. Intertempe s-ino Kohrs verkis multajn libretojn por helpi la geknabojn lerni kaj



uzi la internacian lingvon. Kelkajn el ili infanoj mem ilustris, kaj multaj enhavas demandojn kaj respondojn. Du temas pri geografio. Ŝi verkis ankaŭ "konversaciajn" kantojn, kiuj estas haveblaj sur la kasedo *Kantu Esperante kun Janico kaj Johano.*

Krom kreado de libroj, s-ino Kohrs starigis tri mondvastajn projektojn: *Mondo-Rondo* ekde 1991 (interŝanĝo de bildkartoj kun amuzaj demandoj); *La Monda Stelaro* (per plenumo de etaj taskoj, infano povas iĝi "steleto" kaj ricevi atestilon kaj libreton); kaj *Ago-Tago por Infanoj* (je la sama tago ĉiuj infanoj kantas *Sur la Tero*).

Per fonduso, IĈLM ebligas al infanoj en nepagipovaj landoj ricevi la materialojn kaj informojn kiujn kreis s-ino Kohrs, kaj kiuj disvastiĝis tra la tuta mondo. Kvankam pro gravaj malsanoj dum la pasintaj kelkaj jaroj ŝi ne plu povas instrui en klasĉambro, ŝi laboradas de sia lito, kaj jam entuziasmiĝas pri la estonteco de E-o per e-poŝto kaj la TTT, "aparte kiam infanoj uzas ilin."

***Doroteo Holland***

*[Sur la foto: Charlotte Kohrs kun gelernantoj, en la bazlernejo "Freese"]*



***RENÉE TRIOLLE***

## Kolokvo pri la propedeŭtika valoro de E-o dum UK en Aŭstralio

Tiu lanĉosesio de pli grandskala dujara projekto venigis kvindekon da esperantistoj. El la kvindeko de invititaj fakuloj pri lingvoinstruado aŭ edukscienco, senkulpiĝis la Ministro pri edukado, s-ro Lucas, Profesoro Lo Bianco, estro de la lingvo-planado pri lingvoinstruado, Prof. Denise Bradley, vicdekano de la Universitato de Suda Aŭstralio, Prof. Dennis Binnion el Workers Education Association, Robert Knight, lernejestro de la Internacia Lernejo Glenunga. Ĉeestis tri: Peter Mühlhäusler el la Centro por Eŭropaj lingvistikaj studoj de la universitato de Adelajdo, kiu intervenis en la diskuto; ĵurnalistino de presagentejo Reuters, kiu tre serioze sekvis la tutan debaton, kaj malfruintino, kiu ne prezentis sin!*



*Nunaj kaj pasintaj eksperimentoj*

1.1 en Litovio (raportas P. Jegorovas): E-o estis instruata fakultative en mezlernejo en 1978, 21 studhorojn jare, 1 horon semajne en 27 lernejoj, sed mankis instruistoj. En 1993, post la enkonduko de nova eduksistemo, E-o fariĝis elektebla studobjekto (72 lecionoj jare). Preparata estas lernolibro, eldonota de la Ministerio pri Eduko.

1.2 en Italio (raportas Maŭro la Torre): kadre de interkultura edukado, malfermiĝis neĉeesta kurso por instruistoj. La celo estis unue trejni instruistojn pri lingvoj: aliĝis pli ol 1100. En lingvolernado influon havas kaj emociaj faktoroj kaj lingvokapablo. Planitaj estas interretaj aŭskultejo/ prononc-ekzemplejo/ laŭtlegejo/ priparolejo/ kvazaŭkonversaciejo.

1.3 en Koreio (raportas Lee Nákkee) pri la aplikebleco de la Padernborna sistemo en koreaj lernejoj. La unua fremda lingvo estas la angla (ekde mezlernejo ĝis 1996, nun ekde la elementa lernejo). Tamen malgraŭ multjara lernado de la angla, ne eblas interkomunikiĝi, ĉar la angla kiel aliaj eŭropaj lingvoj, estas tute malsama, kaj instrumetodo, kiu emfazas la gramatikon pli ol ekzercadon de aŭdado kaj parolado, ne taŭgas. La angla estas malfacila, ĉar la sintakso, precipe la vortordo, estas malsimilaj; la korea lingvo ne havas fonetikan signon; la verboj estas komplikaj, necesas transsaltigi la propran pensmanieron.

1.4 en Aŭstralio (raportas Jennifer Bishop) pri la projekto EKPAROLI (Esperanto Kiel Propedeŭtiko al Rapidigo de Orientlingva-lernado kaj Instruado), lanĉita en 94 en la ŝtato Viktorio, en 3 lernejoj, kie oni instruas nur la anglan. Tiu eksperimento uzis (post kreado) konformajn modelojn por la lingvoinstruado; implikis nespertajn instruistojn de LOTE (lingvo alia ol la angla), taksis inklinojn, opiniojn kaj atingojn de la instruistoj kaj lernantoj.

*Kiel uzi tiujn eksperimentojn?*

La lernebleco de lingvo fontas en ĝia reguleco. E-o estas pli lernebla pro simpleco kaj natureco. Tiam intervenis prof. Mühlhäusler: interese estus kompari E-on kun piĝinaj lingvoj kaj studi la nivelon de la komunikado. Ofte en E-medio, instruado al infanoj tuj nomiĝas eksperimento. Tamen mankas sciencaj eksperimentoj, taŭgaj instruistoj kaj studoj pri lingvoinstruado.

Tiu tuta mozaiko estas interesa en si mem, ĉar ĝi implicas 4 tavolojn:




* instruado de la lingvo
* sciencaj eksperimentoj (faritaj de lingvoesploristoj)
* studoj pri lingvoinstruado kaj teĥnologio (per eldonaĵoj, konferencoj, seminarioj)
* kadraj formalaj projektoj por kunligi la 3 unuajn

Prilabori la kadran formalan projekton, forgesante la revon, sed restante en la realeco:

Komenci informkolektadon por scii, kio estas farenda, kun helpo de ILEI: jam en la lernojaro 97-98 instrui en klasoj, celante precipe la interkulturan edukadon. La konkreta rezulto povas esti ekspozicio surbaze de la korespondaj interŝanĝoj.

Starigi triopon por kunordigi la mezuradon. Proponitaj estas Alan Bishop, Duncan Charters kaj Maŭro la Torre, kiuj profesie jam havas tiun studkampon. Ili provos venigi aliajn profesiulojn, neesperantistojn.

Prepari en 1998 dutagan seminarion, kiu okazos dum la UK en Montpellier pri "Modelo de lingvopolitiko kaj interkultura edukado", al kiu ni invitos eksterulojn (respondecas pri la organizado Renée Triolle, pri la programo Maŭro la



Torre). Ni esperas tion fari sub la ŝildo de UNESKO, kadre de ties programo Linguapax.

Havi dum la lernojaro 1998-1999 plurlandan eksperimenton kun apogo de oficialaj instancoj, kun fina kontrolo en Berlino dum la UK 1999.

***Renée Triolle,***
*vicprezidanto de UEA pri Edukado*


*[* NdlR - Laŭ la informoj de nia redakcio, temas pri s-ino Irene Janiszewska, West Lake Shore Schools, Suda Aŭstralio. Sur la foto: partoprenantoj de la ILEI-Konferenco en Avalon.]*

***RENATO CORSETTI***

## Propede...kio?

Fantomo kuras tra Esperantujo. Temas pri la propedeŭtika valoro de E-o. Verdire temas ne nur pri fantomo, ĝi jam akiris la forton kaj solidecon de vera statuo. Pro la graveco de ĉi tiu temo por la legantoj de IPR, ni provu iom kritike trakti ĝin.

La ideo ke E-o helpas lerni aliajn lingvojn estas tre malnova. Jam en la komencaj jardekoj de ĉi tiu jarcento oni interesiĝis pri ĝi kaj ekfaris eksperimentojn. Ĝi akiris vastan eĥon en la lastaj jardekoj precipe danke al la agado de prof-ro Frank en Germanio. Prof-ro Frank havas multajn meritojn, sed inter la plej gravaj, laŭ mi, estas la fakto, ke li persone ne respondecas pri la enkonduko de la scienceca kaj pedagogieca termino "propedeŭtiko". Li ĉiam parolas pri "lern-faciligo". Pri tio fakte temas. Ĉu la kono de E-o faciligas la lernadon de aliaj lingvoj?



Ĉi-terene la sekvantoj de la ideoj de prof-ro Frank, kaj precipe la "normalaj" esperantistoj, kunmetas aferojn, kiujn oni prefere ne kunmetu. Pro tio ni eble devas distingi malsamajn specojn de "lern-faciligo".

**Ekzistas iu "ĝenerala lern-faciligo pro kono de lingvoj".**

Estas vero (kiel asertas la literaturo pri ĉi tiu fako, sed kiel ni mem proprasperte povas konfirmi) ke studado pri iu ajn lingvo altigas la kapablon plustudi aliajn lingvojn. Mi kredas, ke pri tio ni ĉiuj povas konsenti. Cetere la subtenantoj de la latina ripetadis tion dum jardekoj, aŭ eĉ jarcentoj. La (neesperantistaj) subtenantoj de dulingveco asertas ĝuste, ke dulingvaj infanoj estas meznombre mense pli malfermaj pri lingvoj kaj lingvaj fenomenoj, ktp.

Alivorte, ju pli oni okupiĝas pri lingvoj, des pli facile oni lernas aliajn lingvojn. Tio validas por ĉiuj lingvoj kaj prilingvaj studoj. Alivorte, hungaro lerninta la latinan

poste lernos la japanan pli facile ol unulingva hungaro, kiu neniam lernis fremdan lingvon. Same oni povas diri, ke dulingvulo en la mongola kaj la taĝika lernos la anglan pli facile ol unulingva mongolo.

Ĉar E-o estas lingvo inter la lingvoj, mi kredas, ke ni ĉiuj povas konsenti ke lernado de ĝi efikas facilige almenaŭ same kiel lernado de iu ajn alia lingvo.

Alia vero, pri kiu ĉiuj lernintoj de E-o informas nin, estas ke E-o estas relative facila. Je ĉi tiu punkto oni rajtas sin demandi: por kiu? Certe por italoj ĝi estas pli facila ol por japanoj. Ĉu ĝi estas por ĉiuj pli facila ol ĉiu ajn alia lingvo? Pri tio mi ne kapablas respondi kaj mi eĉ suspektas ke ne. Sed certe ĝi estas (relative) facila.

Do, se E-o estas lingvo kaj se la studado de iu ajn lingvo donas iun lernfaciligon por poste lerni pliajn lingvojn, oni povas argumenti, ke indas por studentoj lerni E-on prefere ol lerni aliajn pli komplikajn lingvojn.

Oni rajtas argumenti, ke studado de E-o estas unuflanke relative "malmultekosta" el la tempa vidpunkto kaj aliflanke ĝi, almenaŭ kiel aliaj lingvoj, altigas prilingvajn kapablojn.

**Ekzistas poste iu "lernfaciligo pro emocioj".**

La fenomeno de sukcesa lernado de fremda lingvo estas tre komplika fenomeno. Kelkaj studantoj de la fenomeno malkovris finfine, ke la sinteno de la lernantoj, ilia rilato al la instruistoj, iliaj emocioj pri la lingvo, kiun ili studas, respondecas pri la sukceso almenaŭ same kiom la instru-metodo.

Alivorte, oni povas provi instrui al vi la uzbekan aŭ la leceburgan per la plej modernaj metodoj kaj iloj, sed se vi malŝatas tiujn lingvojn, ties parolantojn kaj la instruiston, vi neniam lernos ilin. Tio estas ankaŭ parto de nia komuna esperantista scio. Multaj el la plej bonaj esperantistoj lernis E-on per aĉaj lernolibretoj, kiuj estus konsideritaj de pedagogiaj komisionoj netaŭgaj por instrui ion ajn. Tio klarigas, laŭ mi, ankaŭ la sukceson de la kursoj por lerni la hebrean en Israelo. Temas ne pri miraklo de la metodo (kiel la instruistoj mem en tiuj lernejo emas kredi), sed pri la granda deziro de la lernantoj lerni por integriĝi, por iĝi israelanoj.

En la nuna momento E-o kaj esperantistoj ja havas la entuziasmon por entuziasmigi lernantojn. Kie aliloke oni trovas instruiston, kiu proprakoste aĉetas la lastan eldonon de Asteriks kaj donacas ĝin al siaj lernantoj, kiu skribas al siaj eksterlandaj geamikoj por trovi korespondantojn por siaj lernantoj, kiu pretas akompani la lernantojn al aranĝoj en kiuj la lingvo estas parolata, ktp.?

Ĉiuj raportoj pri pasintaj eksperimentoj raportas pri la granda entuziasmo de la lernantoj post la kursoj.



Estas parto de ĉi tiu emocia lernfaciligo la fakto ke pro la facileco de la lingvo oni povas efektive komuniki en relative malmulta tempo kun homoj el multaj kulturoj, ktp.

**Ekzistas fine "lingva lern-faciligo" aŭ "lernfaciligo pro la lingvo mem".**

Alivorte, se mi jam studis la polan, poste mi povas utiligi miajn sciojn por studi la rusan pli facile ol mia amiko, kiu ne studis lingvon same parencan al la rusa, kiel estas la pola.

Multaj eksperimentoj, interalie tiuj de prof-ro Frank, provis pruvi tion rilate al E-o. Bedaŭrinde en ĉi tiu lasta speco de "lern-faciligo" E-o havas malsamajn efikojn en malsamaj situacioj. Alivorte oni devas konsideri ne nur E-on sed ankaŭ la gepatran lingvon de la lernantoj kaj la trian lingvon, kiun ili lernos post E-o.

Ju pli la unua kaj la tria lingvoj estas samaj inter si kaj malsamaj rilate al E-o, des malpli E-o havas lernfaciligan valoron (en ĉi tiu mallarĝa lingva senco, kiun ni pritraktas nun).

Alivorte, se iu pruvas, ke E-o estas propedeŭtika por hungaroj, kiuj volas lerni la italan, oni ne rajtas el tio salti al la konkludo, ke ĝi estas propedeŭtika ankaŭ por italoj, kiuj volas lerni la anglan.

La sŭahila, el ĉi tiu lingva vidpunkto, estas multe pli propedeŭtika ol E-o, se la tria lingvo, kiun oni devas lerni, estas la runda.

Do, evitu, se vi same opinias, la disvastigon de la mito pri "absoluta propedeŭtikeco por ĉiuj lingvoj" surbaze de "sciencaj pruvoj", "universitataj eksperimentoj", ktp., ĉar simple tiuj eksperimentoj, se oni analizas ilin iom proksime, montras, ke efektive ili ne estas tiel pruvokapablaj, kiel bedaŭrinde nia movada mitologio provas prezenti ilin (ĉu mi diru "sukcesis prezenti ilin"?).

Ĉar multaj el la laŭtaj "propedeŭtikistoj" estas okcidenteŭropanoj, kiuj volas komprenigi al la publiko ke E-o estas propedeŭtika por la angla (ĉar tiu estas la fremda lingvo, kiun oni nun volas studi), precipe al tiuj mi diras, ke ili estu prudentaj. Ĝenerale, pro pure teoria lingva komparo de la angla kaj E-o, mi ne sukcesas kompreni per kio E-o devus helpi italon aŭ germanon lerni la anglan. Ĉu ĝi havas fonologian sistemon, mezan inter okcidenteŭropaj lingvoj kaj la angla? Ĉu ĝi havas fiksitan vortordon kiel la angla? Ĉu ĝia vorttrezoro...? Ktp.

Tio, tamen, neniel signifas, ke mi subtaksas la homojn, kiuj klopodas instrui E-on en la lernejo, aŭ ke mi pensas, ke oni ne devas provi instrui E-on en lernejoj. Eĉ male. Mi pensas, ke oni rajtas paroli pri la du unuaj specoj de propedeŭtikeco, sed, ke oni devas esti ege prudenta pri la tria.

Mi ankaŭ ne subtaksas la faritajn eksperimentojn. Mi nur diras, ke ofte, tre bonintece, niaj movadanoj konfuzas eksperimenton, kiu nur celas pruvi, ke post

unujara lernado de E-o oni povas paroli ĝin, kun eksperimento pri ĉi tiu lingva lernfaciliga valoro, kio estas io tute alia ol la fakto, ke E-o estas facila. Krome oni emas tro multe ĝeneraligi. "E-o estas propedeŭtika" signifas ofte ke "E-o estas propedeŭtika por ĉiuj lingvoj en ĉiuj situacioj". Tio ne povas esti vera. Oni ne promesu miraklojn, kiuj poste ne efektiviĝos.

Estu fine dirite, ke la kialo de ĉi tiu artikoleto estas la verko de Katalin Smidéliusz, hungara instruistino kaj scienca esploranto pri lingvo-instruado, kiu inter la okupiĝantoj pri ĉi tiu temo estis inter la unuaj, kiuj komprenis, ke oni devas reformuli la tro ĝeneralajn asertojn pri propedeŭtikeco kaj ke oni devas analizi la konkretajn kazojn. Ŝia verko "*Analisi Comparativa del Lessico Italiano Esperanto ed Ungherese a Fini Didattici*" (Kompara Analizo de la Itala, Esperanta kaj Hungara Vorttrezoro por Instruaj Celoj) estas eldonita en 1997-a en Milano de la itala eldonkooperativo COEDES. Ĝi estas konstruita laŭ tre rigora metodo kaj ĝi provas antaŭdiri la lernfaciligan econ de E-o por hungaro lernonta la italan. La verko estas akirebla pere de la normalaj libroservoj, sed ĝi estas baze en la itala. Espereble Katalin eldonos en E-o la tutan disertacion: Parto de ĝi estas la verko ĉi tie menciita.

***Renato Corsetti,***
*Colle Rasto IT-00036 Palestrina, Italio, corsetti@itelcad.it*

## EL LA LANDOJ KAJ SEKCIOJ

# Albanio

### El la jarraporto de la albana ILEI-Sekcio

*Kursoj*: Okazis lernokursoj nur en Tirana kaj Duress, en ties gimnazioj, teknologia mezlernejo kaj bazlernejo en Tirana. Oni aranĝis ankaŭ kursetojn, duonmemstarajn en grupoj po du-tri personoj en Tirana, Lezhe, Kukes, Peshkopi, Elbasan.

*Ekzamenoj*: Krom ordinaraj naciaj ekzamenoj, en la elementa nivelo sukcesis ĉ. 45 personoj. Unuafoje ĉi-marte oni aranĝis IE de UEA/ILEI gvidata de s-ino Marija Beloŝevič, sekretario de ILEI. Ĉe la elementa kaj meza niveloj sukcesis 9 personoj.

*Instruiloj*: Agim Peraj (Shengjin) anoncis sian lernolibron: 10-lecionan, akompanatan de vortareto. Gjegji Gusho daŭrigas sian laboron pri alia lernolibro.

*Propagando*: Aperis nova, 7-a numero de la albanlingva bulteno *Esperanto Sot* (Esperanto hodiaŭ). Dufoje oni aranĝis intervjuadon en la ŝtataj radio kaj televido, aperis ankaŭ pluraj artikoloj en enlanda gazetaro.

***Bardhyl Mezini,*** *sekciestro*



# Aŭstralio

### El la jarraporto de la aŭstralia sekcio de ILEI

1. *Membraro* – Queensland (2), NSW (1), Victoria (4), Sud-Aŭstralio (1), Okcident-Aŭstralio (1)

2. *Lernokursoj* – Somerlernejo de Esperanto en Aŭstralio, januaro 13-25-an 1997, okazis en Adelaide, Sud-Aŭstralio, proponante kursojn je 4 niveloj. La instruistoj estis s-ro Stefan MacGill (2,4), s-ro Nikola Rasic (3,4), s-ino Jennifer Bishop (2,3) kaj s-ino Vera Pajne (1).

* Somerlernejo de Esperanto inter la 11-24-a de januaro 1998, okazos en Ipswich, Queensland. La programo inkluzivos matenajn kursojn je 5 niveloj kaj kvar ekskursojn. La nova 5-a nivelo provizos al kompetentaj esperantistoj tempon por kunlaborado iliacele kaj por la antaŭenigo de E-o en Aŭstralio

* La perkorespondan kurson estras s-ino Hazel Green, Queensland. La nombro da novaj aliĝintoj al 5 diversaj kursoj por 96/97 estas 37, inkluzive de 1 el Afriko. Ili estas prizorgataj de 11 kursgvidantoj.

* Instruado en elementaj lernejoj okazas en kvar ŝtatoj:

- *Queensland - The Adventist School, Ipswich - Karakan Kochardy*
- *New South Wales , Nymboida PS* (elementa)- *Vaniita Laidlaw*
- *Victoria , Carrum PS - Jennifer Bishop*, 105 gelernantoj en 4 klasoj
- *Okcident-Aŭstralio, Perth - Montessori PS - s-ino Cheryl Ridout*

* Universitato de la Tria Aĝo - en Queensland 3 grupoj, en Viktorio 1 grupo.



* Instruado okazas en ĉirkaŭ 16 kluboj tra la tuta lando.

3. *Ekzamenoj* – S-ro Marcel Leereveld, komisiito pri ekzamenoj de Aŭstralia EA kreis tri novajn 3-4 horajn ekzamenojn: bazan, mezan kaj altan, kiel instigojn al lernantoj fari la jam ekzistantajn hejme skribatajn ekzamenojn: elementa, supera kaj klereca. Dum 1997 sukcesis entute 32 personoj en diversaj niveloj.

4. *Propagando* – La sekcio kontribuos ILEI-rubrikon kadre de la gazeto *Esperanto Sub la Suda Kruco*, organo de Aŭstralia EA. Jam aperis raporto de Jennifer Bishop pri la 31-a ILEI Konferenco. Per ESSK espereble estos varbataj pli da ILEI-anoj.

*[Sur la foto: E-lernantoj de elementa lernejo "Carrum", Melbourne. Dum la Tago de Lernejo dum UK ili prezentis skeĉon laŭ Mazi en Gondolando.]*

*Laŭ* ***Jennifer Bishop****, Estrino de Aŭstralia ILEI-Sekcio*

## Belgio

*Georges Sossois* (Belgio) sukcesis instrui E-on al kelkdeko da belgaj (franclingvaj) sindikatanoj. Por pruvi la utilon de la lingvo kaj por spertiĝi ili nun bezonas kontaktojn kun alilandaj sindikatanoj.

Interesitaj esperantistoj-sindikatanoj bonvolu anonci sin ĉe unu el la subaj adresoj. Utilas mencii specialiaĵon, funkcion, ktp. Ankaŭ personoj el landoj kie sindikatoj nur en embria formo ekzistas, estas bonvenaj. Belgaj sindikatoj havas tradicion de asisto en formo de trejnado kaj praktika helpo.

Provizoraj kontaktadresoj:

Poŝte: s-ro Germain PIRLOT, Steenbakkersstraat 21, BE-8400 Oostende

Fakse: s-ino Flory WITDOECKT, +32-59-802342

Rete: s-ro Roland ROTSAERT <rotsaert@knooppunt.be>

***Roland Rotsaert****, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio*

## Brazilo

En la urbo *Jundiaí* (Brazilo) funkcias dujara E-kurso kun la gvido *de Lucas Yassumura*. S-ro *Yassumura* por la unua jaro uzas la metodon de la libro *Teach Yourself Esperanto*, kiun li tradukis al la portugala lingvo kaj adaptis al la loka situacio. Ĝi enhavas bazan kaj meznivelan gradojn, do, post la unua jaro, oni estos preparata lerni E-on ne uzante la nacian lingvon. La duan jaron li dividas en du semestrojn. Dum la unua semestro li instruos per Cseh-metodo, tiel preparante la gelernantojn al la E-mondo. La dua semestro de la dua jaro estos tre specifa por la Spirita Centro kie li instruas E-on. Li formos rondojn por diskuti la moralaĵojn de la doktrino spirita, kaj la uzota libro estas *La Evangelio laŭ Spiritismo* de la franco *Allan Kardec*.

La ĉiusabatan kurson partoprenas 21 gelernantoj el diversaj soci- kaj kulturtavoloj. La kurso estas senpaga por ili.



Okazas kurso de Spirita Centro ankaŭ en la urbo *Araraquara*, kun partopreno de 15 gelernantoj. Tiu kurso celas nur la ekkonigon de la lingvo kaj eble daŭros 3 aŭ 4 monatojn. La instruistino estas s-ino *Aparecida Ruiz Tagliari*, vicdelegitino de UEA.

*Informis: Lucas Yassumura <lukasys@ibm.net>*

### Leĝo malfermas pordojn

Proponi la enkondukon de E-o en publikajn lernejojn pere de leĝoj estas strategio kiu povas doni bonajn rezultojn, depende de kelkaj cirkonstancoj.

La e-istoj el la brazila urbo *Goiánia*, en la provinco *Goiás*, organizitaj ĉe Kultura Esperanta Centro, elektis tiun vojon por antaŭenigi E-on en la regiono. Pli frue, en 1993, iniciate de la prezidanto de KEC, S-ro *Dilmá Cavalcante Bandeira*, kaj kun la apogo de la tiama urba konsilanto *Elias Rassi Neto*, estis aprobita la leĝo kiu "pritraktas la instruadon de la internacia lingvo E-o en la municipa publika reto de edukado". Interese estas, ke la leĝo garantias la devigan partoprenon de KEC en la elekto de la instruistoj kaj en la ellaborado de la programo de la kursoj.

Ĝis nun la konkretigon de la leĝo malhelpis la manko de instruistoj profesinivelaj, tamen, plej laste KEC ekentreprenis programon por solvi tiun problemon. Jam estas unu instruisto, kiu apartenas al la publika reto kaj bone scias E-on.

Surbaze de tiu konkreta situacio, oni ellaboris la projekton "ESPERANTO EN LA LERNEJOJ", por la enkonduko de E-o ĝis marto 1998. La projekto prezentas la jenajn celojn:

1) Instrui la lernantaron de la dua fazo de la urbaj lernejoj de *Goiánia* paroli, legi kaj skribi en E-o.
2) Instigi la interŝanĝon inter tiuj lernantoj en *Goiánia* kaj alilandaj lernejanoj pere de leteroj kaj interreto.
3) Kunlabori por la faligo de la lingvaj baroj ekzistantaj inter la popoloj.

La projekto proponas, kiel unuan paŝon, la enkondukon de E-o en unusolan lernejon, kiu fariĝos modelo por la pliampleksigo de la agado. La dua paŝo estos starigo de rilatoj kun internaciaj E-organizaĵoj, kiel *Kastora Klubo, Koresponda Servo Mondskala* kaj *Fondaĵo Talento*. Sekvos la organizado de renkontiĝoj, kaj kulturaj aranĝoj, cele al aplikado de E-o. Pri la formado de novaj instruistoj de E-o, oni konvinkos instruistojn de la reto mem lerni la internacian lingvon, por ĝin instrui flanke de geografio, matematiko kaj aliaj lernobjektoj. Paŝo post paŝo, la esperantistoj el *Goiánia* klopodos senpravigi brazilan popolan konvinkon, kiu asertas, ke en Brazilo ekzistas leĝoj kiuj vivas, kaj leĝoj kiuj mortas.

***Fabrício Rodrigues Valle****, Brazilo*

## Finnlando

### Kunlaborantoj serĉataj

Mi volas fari unuavice por finnlingvanoj multmedian E-kurson (t.e. kun pli da interaktiveco ol ĉe la nuna TTT) kadre de prezento de E-o per multmediaj rimedoj. La rezulto aperos en laserdisko (KD). Mi atentos fari la verkon tia, ke eblos facile ŝanĝi la finnlingvaĵojn je alilingvaĵoj - kiom eble plej multe estos havebla ankaŭ en E-o (sur la ekrano preskaŭ ĉiam videblas la butono per kiu oni povas ŝanĝi la lingvon).

Mi tre bezonas kunlaborantojn. Por la kurso mi serĉas taŭgan lernolibron (ekz. min interesas programitaj E-kursoj) el kiu mi povus konstrui la materialon. La kurso estas la plej laboriga parto de la tuto. De la cetero ekzistas jam io montrebla kaj mi esperas, ke ĝi, kiel tia, jam povas utili al io (ekz. montri E-on en foiroj surekrane).

Jen estas ĉio, kion mi nun povas sciigi pri la afero. Mi petas monan helpon de EAF, kiam mi havos eblecon montri la verkon kaj estos farinta precizajn kalkulojn pri la kostoj kaj povos bone demonstri la utilecon. La ĉefa problemo estas tamen manko de kunlaborantoj, ĉu finnaj ĉu alilandaj. ***Matti Lahtinen,***

*Jyvaeskylae, Finnlando, matlah@sci.fi*

## Germanio

**4-a Printempa Lernejo Internacia** ***(PLI), en la kadro de la 14-a Printempa Semajno Internacia (PSI) - Bonn, 6-13 aprilo 1998***

PLI estas speciala aranĝo por gejunuloj inter 10 kaj 16 jaroj, kiuj almenaŭ iomete parolas la internacian lingvon. Dum PLI okazas kursoj pri kaj en E-o. La gelernantoj loĝos en komunaj ĉambroj kaj lernas, ludas kaj festas kune.

Oni aranĝos kursojn ankaŭ por plenkreskaj komencantoj kaj progresintoj. Krome, okazos ĉiutagaj Mazi-kursoj por infanoj.

Aliĝoj kaj informoj: *Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr - Ahrweiler. Tel. +49-(0)2641-4885. Rete: psi@esperanto.de*

## Hispanio

### Informoj de Hispana Esperanto-Federacio

Nia asocio funkciigis antaŭ monatoj perkorespondan kurson kiun eblas partopreni ankaŭ rete. La respondo ĝis nun ne estas granda (ĉ. 20 lernantoj) sed ni estas tre optimismaj, pro la bona kvalito de la materialo kaj la ĝenerala funkciado de la afero. Ni sendas la tutan materialon unufoje, kaj poste la lernanto rajtas sendi kiam ajn kaj sen tempolimo la ekzercojn por korekto.

La materialo konsistas el:

– lernolibro de Miguel G. Aduriz



– memproduktita kasedo kun la legaĵoj de la libro

– 200-paĝa ekzercaro bazita sur tiu de la libro

– informlibro (la hispana traduko de "La Fenomeno Esperanto" de Auld)

– fina ekzameno kaj atestilo

Krome, ĝi inkludas plenrajtan aniĝon en la asocio dum unu jaro.

La nuna prezo de la kurso (poŝta aŭ reta) en Hispanio estas 14.900 ESP (minus 10% por junuloj kun ia junulkarto).

***Marcos Cruz,*** *vicsekretario*

*Federación Española de Esperanto / Hispana Esperanto-Federacio*

*Rodríguez San Pedro 13-3-7, ES-28015 Madrid - Tel./Fax: +34-(9)1-4468079*

*http://home.adv.es/esperanto - esperanto@adv.es*

## Irano

### E-instruado en irana universitato

En Irano E-o enviciĝos ĉe specialaj fakoj, kiel aliaj fremdaj lingvoj studataj, kiujn studentoj en universitatoj rajtas elekti por siaj studoj.

Pri tio parolis *Prof. M.H. Saheb-Zamani* (honora membro de UEA kaj ILEI) la 18-an de junio 1997 en Tehrano, ĉe irana universitato nomata "*Shahid Beheshti*" (plej granda kaj grava enlande), kiam li malfermis la 142-an E-kurson dum sia ĉ. 25-jara E-instruista vivo.

Prof. *M.H.S* ekinstruis en tiu ĉi universitato antaŭ 6 jaroj, kaj nun li gvidas sian 29-an kurson ĉi tie. Kelkajn kursojn li gvidis private, por la profesoroj kaj estraranoj de la universitato. Oni plene fidas lin, ja li havas multe da spertoj ankaŭ pri




aliaj sciencaj kampoj, kiel psikologio, lingvistiko kaj literaturo. Li estas fama verkisto pri homaj, psikologiaj malfacilajoj, krome li esploras teozofion. Krom ĉio ĉi li estas unu el la plej grandaj propagandantoj de E-o, kiu persiste celas oficialigi E-on en sciencaj centroj, kiel universitatoj, lingvaj institutoj kaj akademioj.

Ankaŭ la edzino, *s-ino Sedigi Saheb-Zamani* helpas lin aranĝante perfektigajn

E-kursojn, tradukante el E-o en persan lingvon kaj inverse, partoprenante E-kongresojn eksterlande kiel la irana ĉefdelegito. (Ŝi estas la unua virino, kiu gajnis ĉefdelegitecon en Azio.)

Laŭ *M.H.S.* estas tre grave por la disvastiĝo kaj oficialiĝo de E-o, ke la instruejoj kaj sciencejoj rekonu kaj apliku ĝin.

Menciindas, ke la 65-jara profesoro eĉ nun, kiel emerito, gvidas 6 kursojn semajne en la universitato kaj en la Irana E-Centro. Estas interese, ke li instruas samtempe lernantojn, kiuj kelkfoje eĉ gimnazian diplomon ne havas, kaj aliflanke, en la universitato altgradajn profesorojn. Sed ili ĉiuj - helpe de la toleremo de la profesoro - trankvile daŭrigas E-kursojn.

*[Sur la foto: profesoro M.H. Saheb-Zamani instruas E-on en la Universitato "Shahid Beheshti". La foton faris Naser Asgar-Zadegan]*

*Laŭ la informoj de* ***Mojtaba Kheir-Khah***
*37, K. 135, 10 Metry Dowom, Javadieh, IR13657 Tehrano, Irano*

# Italio

## Freneza galopado sur gramatika tereno

*(raporto de Fedora Redell pri la aprila Triesta Seminario)*

Kiu sin taksas sperta instruisto kaj bona Esperanto-parolanto, devus iam ĉeesti Seminarion sub gvidado de Katalin Smidéliusz. Celo ja ne estas malkovri, kian sci-nivelon pri gramatikaĵoj oni atingis, sed ĝuste testi siajn konojn, por ke eliĝu el tiu testado la instigo daŭre kaj konstante streĉi al pliperfektiĝo. Estas fakte bedaŭrinda realo en Esperantujo,ke tiu, kiu finas duagradan kurson, jam opinias esti atinginta sufiĉan kapablon por transdoni al aliaj la lernitaĵojn. Pri tio mi certas, ĉar ankaŭ mi faris - tiutempe - similan mispaŝon: post sukcesa triagrada ekzameno, tuja atako de la instrukampaj viktimoj - kompatindaj novlernantoj. Ja ne sufiĉas entuziasmo, ne sufiĉas memfido, ne sufiĉas teoriaj konoj: instruisto devas posedi multe pli.

Tritaga bombado intensa, preskaŭ senhalta, ĉar eĉ la tiel diritaj teo/kafo-paŭzoj estis motivo kaj momento por lerni, por kompari, por kompreni kiaj kaj kiomaj mankoj estas en la propra Esperanto-provizejo. Ĉiuj seminarianoj estis bone konataj esperantistoj, kompetentaj, aktivaj en la poresperanta agado, oftaj partoprenantoj de kongresoj, renkontiĝoj, konferencoj ktp. do, homoj bone regantaj la lingvon, plejparte spertaj instruist/ant/oj: sed kiom da duboj vekis en ĉiuj Katalin, kiom da gramatikaj eraroj aperis en la diversaj testoj, kiom da malperfektaĵoj eĉ en banalaj situacioj!

Kompreneble ĉio ĉi estas opinio de la subskribinto, eble la impresoj de la aliaj estas tute malaj kaj malkonsentaj. Estus interese koni ankaŭ aliajn komentojn. Pri la Seminario restis en mi nuraj pozitivaĵoj, ĉar kun granda ĝojo mi bonvenigis la kompareblecon, la juĝon kaj kritikon pri miaj malkorektaĵoj, la



senkompatajn batojn (diable! kiom da!) kiuj preskaŭ detruis tiun memfidon pri mia sufiĉa kompetenteco rilate Esperantan gramatikon. Sed - kiel jam dirite - la tuto bone efikis, ĉar pli granda fariĝis la deziro serioze progresi ĝis - se ebla - tutperfektiĝo.

Do, dankon al eksterordinara instruistino, plene meritanta tiun "ist", dankon al komencantoj, niaj kobajoj, dankon al seminarianoj: ĉiuj kontribuis al sukceso de neforgesebla tritaga galopado sur senfina Esperanto-prerio!

Piednoto: Ĉu la Itala Instituto de Esperanto, kies prioritata tasko estas ĝuste zorgi pri la plibonigo de la instrumetodoj de italaj instruistoj, ne opinias taŭga la organizadon de similaj seminarioj, regule ĉiujare, por ankaŭ povi kalkuli pri iu bone difinita kvanto de vere profesiaj kurso-gvidantoj? Se tion ĝi iniciatos, tutcerte la partoprenontoj estos multe pli nombraj ol en Triesto.

*laŭ La Eta Gazeto 5/97*

# Jugoslavio

*[Jen freŝaj informoj el la septembra numero de InfoSEL - Informilo de Serbia Esperanto-Ligo. La informojn elektronike sendis* ***Renato Petrovic****]*

## E-lernejo en Teslić

La Unua E-Lernejo en Respubliko Serba okazis de la 12-a ĝis la 20-a de julio 1997, en la banloko Banja Vrucica ĉe Teslić, organizite de la Esperanto-Ligo de Respubliko Serba. En la programo de la lernejo estis daŭriga kurso, fakte preparkurso por la ekzameno B. La kurson partoprenis 12 membroj de la societoj el Banja Luka kaj Teslić, kiuj antaŭe finis A-kurson. La kurson gvidis Boriŝa Milicevic kaj Radojica Petrovic laŭ la plano kaj programo de Esperanto-Instituto Beograd. Ses instruhoroj tage estis plejparte plenigataj per intensa lingvotrejnado kun la celo kapabligi la kursanojn por korekta parola kaj skriba lingvouzo. Post la gramatik-traduka metodo, laŭ kiu ili estis instruataj en la A-kursoj, ili konis elementojn de la lingvo, sen aktiva scipovo. En ĉi tiu kurso ili kapabliĝis legi Esperantajn gazetojn kaj librojn, verki mallongajn eseojn kaj interparoli Esperante, al kio aparte kontribuis la partopreno de esperantistino el Japanio - Kikuŝima Kazuko (Krizantemo) en la lastaj tri tagoj. Grava parto de la instruhoroj estis dediĉita al historio kaj kulturo de la Internacia Lingvo, kaj iomete al metodiko de E-instruado. Tamen, fine de la lernado estis organizita nur A-ekzameno por tri gejunuloj el Teslić, kiuj antaŭe ne havis A-diplomon, kaj ĉiuj 12 gekursanoj daŭrigos la preparojn por la ekzameno B, kiu estos aranĝita okaze de La Dua Renkontiĝo de Esperantistoj en Respubliko Serba en la dua duono de septembro en Banja Luka.

Kvankam la lernejo en Teslić ne plenumis la planon de la organizantoj laŭamplekse kaj laŭ nombro de partoprenantoj, konsiderante la socian kaj ekonomian staton en Respubliko Serba kaj la malfacilaĵojn kiujn havis la organizantoj, ĝia plej

grava sukceso estas, ke ĝi okazis. Laŭ la efiko ĉe la partoprenantoj, laŭ la reeĥo kiun ĝi havis en gazetaro kaj televido kaj laŭ la atento, kiun ĝi vekis ĉe aŭtoritatuloj, ĝi signifas gravan eventon en la evoluo de la movado en tiu nova ŝtato post kelkjara sukcesa organizado de A-kursoj en Banja Luka, Teslic, Prijedor kaj Kozarska Dubica, renkontiĝoj, eldona, propa-ganda kaj aliaj aktivecoj. Kun la organizaj spertoj akiritaj ĉe la unua sesio kaj vekita interesiĝo de la estraroj de la banloko kaj de la komunumo kie ĝi okazis, la lernejo havas ŝancon fariĝi tradicia aranĝo kun pli nombraj partoprenantoj kaj pli ampleksa programo (la ĉefa: A, B kaj C kursoj, kaj akcesoraj: E-biblioteko, lingvaj konsultejo kaj kvizoj, tradukista laborejo, metodika kaj organiza konsilejoj).

La lernejo en Teslič altiris du eksterlandajn vizitojn: de trimembra delegitaro de la Junulara Konsilio de Svedio, kaj de la japana esperantistino ĵurnalistino *Kikušima Kazuko*. Ambaŭ vizitoj vekis konsiderindan atenton de aŭtoritatuloj kaj amaskomunikiloj en Banja Luka kaj Teslič montrante praktike, kiom grava povas esti E-o en solvado de la plurjara izoliteco, kiun la nova ŝtato travivas en la internacia komunumo. La delegitaro el Svedio, kiu vizitis Respublikon Serban kaj Muzulman-Kroatan Federacicn por esplori eblecojn de kunlaboro de junularaj organizoj de Svedio kaj Bosnio, eĉ ne estis esperantista, sed ilia gastiganto en Respubliko Serba estis la organizaĵo de esperantistoj kiel unu el la plej aktivaj organizaĵoj okupiĝantaj pri junularo. En oficialaj akceptoj ĉe aŭtoritatuloj kaj en intervjuoj por gazetoj kaj televido, kaj dum senperaj viglaj interparoloj kun neevitebla kunkantado, (kompreneble anglalingvaj, kun junaj esperantistoj), ili klare esprimis sian konvinkon ke esperantistoj povas kaj devas doni ekzemplon kaj helpi al internacia kunlaboro ankaŭ de neesperantistaj junularaj organizaĵoj.

***Radojica Petrovic***

# Kroatio

## Someraj Esperanto-Kursoj en Kroatio

Istrio estas la ĉemara regiono en Kroatio, kie dum kvar kontinuaj someroj okazas E-kursoj organizitaj de Višnja Brankovič el Trieste, kunlabore kun Kroatia Esperanto-Ligo. Dum la antaŭaj jaroj la kursoj okazis en la urbeto Grožnjan, fama pro siaj multaj muzikaj aranĝoj, ĉi-jare la kurso gastis en la urbo Motovun. La kursanoj venis el Argentino, Italio, Britio, Kroatio kaj Hungario, instruis Spomenka Štimec. La kursanoj en progresiga E-kurso havis unikan okazon sperti la plej apartan E-komunumon, tiun de E-on parolantaj familioj: en la samregiona urbo Savudrija paralele kun la internacia E-kurso feriis dudeko da E-gepatroj kun siaj infanoj. La partoprenantoj de la du aranĝoj reciproke vizitis unu la aliajn kaj interŝanĝis prelegantojn. Estis unika okazo, ke la lernantoj tuj vidu kiel funkcias E-o kiel la hejma lingvo. Multaj ekskursoj en la regiono al la marbordo kaj la landinterno helpis plezurigi la ĉeestantojn.

Post la kurso en Motovun ekde la 9-a ĝis la 15-a de aŭgusto Spomenka Štimec



instruis Esperantan literaturon en sia bieno en la vilaĝo Hraščina-Trgovišče por kursanoj el Britio kaj Italio. La lecionoj estis ligitaj al la rolo de la virino en la Esperanta literaturo. La kursanoj uzis la librojn el la Biblioteko Rotkvič, kiun S. Štimec heredis de la kroata akademiano, Ivo Rotkvič, por la biena biblioteko. Ankaŭ tiun kurson organizis Višnja Brnkovič kunlabore kun Kroatia E-Ligo.

Kunkalkulante ankaŭ esperantistojn kiuj ne lernis, sed nur kolektive ripozis velante sur la velŝipoj inter Zadar kaj Dubrovnik, en la someraj E-aranĝoj en Kroatio partoprenis 160 E-parolantoj el 15 landoj. Vere riča estis la Esperanta somero en Kroatio.

***Spomenka Štimec***

# Rumanio

## Paŝoj al progreso

*– [mallongigita teksto – NdlR]*

[...] Inter la 14-a kaj 23-a de julio 1997 okazis en Bixad la 1-a Somera Lernejo "Esperanto + Informatiko". La sukceso estis plena, ĉar niaj gelernantoj neniam povis uzi pli frue komputilojn. La interesiĝo estis tiom granda, ke en kelkaj vesperoj ni devis la infanojn "forpeli" hejmen, ĉar ili daŭre restis apud la komputiloj ankaŭ post la fino de la tagordo.

La 10-tagajn, somerajn interlernejajn kursojn partoprenis 45 lernantoj el du urboj kaj kvin vilaĝoj. Pri ili zorgis teamo de 13 instruistoj: 4 por informatiko, 3 por E-o, 2 por geografio kaj ekoturismo kaj la aliaj kiel helpantoj. Krom la menciitaj studobjektoj, la programo enhavis promenadojn, ekskursojn, ludojn, kulturajn kaj sportajn agadojn. Ĉio ĉi en belega montpejzaĝo, riča je mineral-akvaj fontoj, freŝa kaj forta aero, diverseco de sovaĝaj naturanguloj, kien ankoraŭ ne penetris la mediopoluado.

Ni havis gasto-instruiston, malnovan amikon, s-ron Ton Verwoerd. Per multaj didaktikaĵoj, kiujn li kunportis en sia peza valizo, per multe da amo kaj per sia originala instrumetodo li entuziasmigis la infanojn lerni E-on.

Post 10-taga, streča sed gaja programo ni fermis la kursojn per bela tendar-fajro. Ĝuste en tiu momento alvenis en Bixad du aliaj lertaj geesperantistoj: Dominique kaj Jean-Claude Thumerelle, instruistoj el Belgio. Jean-Claude ricevis la honoron ekbruligi la tendarfajron: tiel komenciĝis la kultura programo kun kantoj, dancoj, ludoj, premioj kaj granda ĝojo. Ĉeestis la gepatroj, la geinstruistoj kaj la komunumestro, kiu gratulis la organizantojn, salutis kaj dankis al la gastoj por ilia ĉeesto.

Dum la amika kunveno post la fermo de la tendaro kune kun la komunum-estro Gábor Balogh, ni debatis la ideon pri eblecoj enkonduki E-on en la socian vivon de la du komunumoj: Bixad kaj Heemskerk. Se tio realiĝos, certe ĝi estos nia plej granda venko.

Jen, montriĝas, kiel bona internacia kunlaborado, je la nomo de amikeco, je la nomo de bono kaj amo, je la nomo de paco kaj interkompreniĝo, povas naski



mirindaĵojn. Al nia sukceso plene kontribuis Bertil Andreasson, kiu akiris por ni subvencion. Li fariĝis honora gasto de nia klubo. Pere de lia helpo ni povis inviti E-grupon de 4 etuloj kaj du instruistoj el la malproksima urbo Turda, kaj aliajn infanojn el 5 vilaĝoj senpage partopreni niajn somerajn kursojn. Ĉu ni devas demonstri pluse kiel povas funkcii efike la internacia solidareco? Kie ekzistas emo, amo kaj volo, ekzistas ankaŭ pavimitaj vojoj. Al ĉiuj, kiuj kontribuis al nia sukceso, ni dankas elkore kaj atendas ilin kiel honorajn gastojn en Bixad.

Kun pli gajaj koroj, la infanoj el Bixad estas decidintaj esplori plu la vastan teritorion de Esperantio. La sekva haltejo estos Kastelo Grésillon, kien ni estas invititaj por la printempa infana renkontiĝo. Ni scias, ke en la mondo ekzistas multaj grupoj kiel ni. Al ĉiuj ni rekomendas kuraĝon, esperon kaj daŭran agadon, la sukceso certege alvenos.

*[Surfote: M. Trifoi parolas pri la historio de la E-Klubo en Bixad dum la Somerlernejo]*

***Mihai Trifoi***
*Esperanto-Klubo Bixad, Rumanio*

# Rusio

## Altlerneja instruado progresas

Laŭ mia pritakso en Ruslando pri instruado de E-o sporade okupiĝas 35 ĝis 40 personoj. La precizaj kvantoj de la kursoj, kursanoj ktp. ne estas konataj, sed mi esperas ordigi tion kune kun aktivigo de la Ruslanda sekcio de ILEI. Tial mi povas kompetente raporti nur pri tio, kion oni faras en Moskvo, eĉ pli konkrete, kion mi faras en la sfero de la instruado de E-o kaj kiel agas MASI (Moskva amikaro de studantoj kaj instruantoj-esperantistoj) en la studenta agado.

### Moskvaj altlernejoj

Ekde septembro 1996 daŭras instruado de E-o en du moskvaj universitatoj: Ŝtata industria universitato (ĜGIU) kaj STANKIN.

En STANKIN la kvaran semestron lernas E-on 10 studentoj de la tria lernojaro, kaj 12 studentoj de la dua lernojaro lernas la unuan semestron.

Ambaŭ grupoj estas specialigitaj kaj apartenas al la fakultato "Rustan" –substrukturo



de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS). En 1997 E-on eklernos ankaŭ studentoj de la unua lernojaro.

En ĜGIU dum la aŭtuna semestro E-o estis instruata en kvin grupoj, sume al 62 studentoj de diversaj fakoj. En la vespera pagata kurso lernas ankoraŭ kelkaj studentoj de ĜGIU kaj de la Universitato Bauman. Instruas Irina Gonĉarova.

### Sekcio de ILEI

Ruslanda sekcio de ILEI ekzistas ekde somero 1994. Nun ĝi havas 24 anojn. La informilo de la sekcio estas Paĝoj pri instruado, aperanta suplemente al *Eksciu, ke*. En 1995 R. Petuĥova kaj en 1996. L. Medvedeva partoprenis en la konferencoj de ILEI. Irina Gonĉarova instruis E-on en KEF (Kultura E-Festivalo) en Danio. Aperis reala bazo por pli serioze trakti la sekcion kaj konformigi ĝian ekziston al la celoj de ILEI, kiuj malsimilas al la kutima imago pri instru-metodika laboro de la instru-metodikaj komisionoj de nia landa asocio.

*laŭ* ***Irina Gonĉarova***

# Usono

## Pasporto al la Tuta Mondo

La unuaj kvar lecionoj de la serio por instrui E-on televizie pretos antaŭ la fino de la jaro 1997. Antaŭmendoj de la unuaj kvar lecionoj kostas 85 USD, kaj antaŭmendoj de la tuta serio de 15 lecionoj ankoraŭ kostas nur 300 USD. La rolantoj venas el ses landoj: Patro - Miko SLOPER (Usono)

Patrino - Leonora TORRES (Meksikio)
Filo - Stephen BODDINGTON (Britio)
1-a Filino - CHIEN Mingchi (Ĉinio)
2-a Filino - Jennifer KORP (Usono)
Gasto - Gi MENAHEM (Usono)
Raportisto - SYOZI Katsunori (Japanio)
Butikistino - Vesna Rogulja HEYMAN (Kroatio)
Detektivo - Steve WAGENSELLER (Usono)

La serio uzos la plej modernajn teorion kaj teknikojn de lingvoinstruado. La ĝisfunde strukturita kaj zorge prilaborita lernosistemo konvinkos profesiajn instruistojn kaj fakulojn, ke ankaŭ esperantistoj kapablas krei, ne nur adapti, taŭgajn instrumaterialojn.

Ĉe la Adelajda UK la Estraro de UEA decidis aŭspicii la projekton; kaj E-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) nun petas kiom eble plej multe da donacoj kaj antaŭmendoj, por ke la sekvaj kvin lecionoj estu filmitaj somere 1998.

Ĉiuj kontribuintoj de minimume 500 USD estos agnoskataj surekrane. Sendu la monon por antaŭmendoj kaj/aŭ donacoj al: *ELNA-Vidbenda Projekto, Box 1129, El Cerrito CA 94530 Usono*, aŭ al *UEA (konto nmvm-n), Nieuwe Binnenweg 176, NL-*

*3015 BJ Rotterdam, Nederlando.*

Petojn por plia informo aŭ demandojn direktu al: *Lusi Harmon, Komisiito de ELNA, 2389 Thackeray Drive, Oakland CA 94611, Usono. Tel. 1-510-531-8393 - Telefaksilo 1-510-531-0152 - lusiharmon@aol.com*

## Zairio

La direktoro de la privata lernejo *Muanga de Kinshasha*, prezidanto de Zaira Esperanto Rondo, informas pri la komenco de E-kursoj en tiu lernejo kaj petas studmaterialon kaj korespondkontaktojn. Sendu leteron al: *Zaira Esperanto Rondo; Av. Bongolo, 10, YOLO-Nord 3 · B.P. 6055-KINSHASHA VI. Zaire.*

***YAMAGUTI SIN'ITI***

# Mia provo instrui Esperanton al mia filo

## *Kiel eblas denaska esperantisto?*

*1) profilo de mia familio*

Mia familio konsistas el 4 personoj; patro (65 jaraĝa), edzino (24), filo (2, nomo: Satiya) kaj mi mem (38). Mia edzino (nomo: Song Hong) devenas el Ĉinio kaj parolas iom(ete) E-on. (Fakte danke al E-o kaj e-istoj en Ĉinio ni konatiĝis kaj sukcesis geedziĝi. Tiusence E-o estas edzo-peranto ĝuste en nia kazo.) Ŝi nun sufiĉe kapablas paroli la japanan, sed iom post iom forgesas E-on, bedaŭ-rinde. Mia patro tute ne scipovas E-on, eĉ ne interesiĝas.

*2) lingva situacio en mia familio*

Kompreneble, estante en Japanio, la dominanta lingvo estas la japana. Kiam komence de la geedziĝo mia edzino tute ne sciis la japanan, la sola lingva ponto inter ni estis E-o. Miaflanke ankaŭ mi iom post iom forgesas la ĉinan, kvankam antaŭ la edziĝo mi pasie lernis ĝin. Tio ŝajnas neevitebla fenomeno ĉe internaciaj geedzoj ĉi tie en Japanio, kie loĝas ĉirkaŭ 10 paroj internaciaj, kiom mi scias. Ili plejparte komunikas japane (estas tamen escepto). Mia filo post la naskiĝo estas alparolata en 3 lingvoj: de la avo japane, de la patrino ĉine, de mi Esperante.

*3) kial denaska esperantisto?*

Kiam mi estis juna (studento), mi estis kritikema al denaska e-isto. Kial?

a) E-o estas por ĉiu popolo egale facila kaj malfacila, por ke ĝi estu neŭtrale homa lingvo. Se ekzistas certa nombro da denaskaj esperantistoj, tio alportas privilegiiton inter la esperantistaro. Ĉar, miaopinie, preskaŭ ĉiuj lernas E-on memvole kaj (eble) pene. Sed denaskaj esperantistoj ne bezonante tian klopodon, kian spertis ordinaraj esperantistoj, parolas tre (tro) rapide kvazaŭ maŝinpafilo, tio en kelkaj okazoj donas embarason kaj konfuzon inter (plejparte maljunaj) komencantoj kaj eĉ progresintoj, kiuj tamen ne havis sufiĉan okazon de E- parolado.



b) Ni, ordinaraj esperantistoj, lernadis E-on kun certa celo aŭ motivo: ĉu pro simple lingva intereso, ĉu pro pacamo, ĉu pro inklino al interna ideo... (sed ne pro komerca profito, mi kredas, ĉar nun E-o ne donas monon kaj laboron, male, postulas monon kaj laboron!) Sed denaskaj esperantistoj ne havas motivon, nek celon, ĉar ili lernis sen konscio kaj intenco. Tio alportus devion aŭ herezon en E-movado, kiu estas heredata kaj evoluigata de esperantistoj, kiuj sin oferis por alta idealo de E-o. Denaskaj esperantistoj ne havante tian idealon ne interesiĝas pri la movado, nur utiligas ĝin por sia propra emo.



c) Aliflanke, oni povas diri, ke denaskaj esperantistoj estas viktimoj de gepatraj esperantistoj. Ili estas devigataj paroli E-on spite sian propran intereson. Ili foje fariĝas ridindaĵo kaj strangulo fare de ĉirkaŭaj infanoj, kiam ili senkonscie elbuŝigas nekomprenatajn vortojn.

Jen estas tri ĉefaj argumentoj, kiujn mi havis, kontraŭ la valoro de denaskaj esperantistoj. Mia opinio nun aliiĝis. Mi ĉi tie nur simple aludas; ĉio dependas de evolu-stadio de E-movado. Se E-o volas kaj devas estiĝi vere internacie vaste uzata lingvo, ĝi nepre devas enhavi certan nombron de nature parolantaj esperantistoj iom post iom forgesantaj sian idealon, kiu tamen almenaŭ en la nuna tempo ne estas forgesinda. La idealo de E-o estas du flankoj de glavo: unuflanke motoro kaj aliflanke balasto.

*4) Kiel mi instruas Esperanton al mia filo?*

Ĉar en la nuna tempo ankoraŭ absolute mankas lerniloj por etaj infanoj, mi nur pere de ĉiutaga interparolo instruas E-on. Sed tion iom helpas "Mil unuaj vortoj en Esperanto". Mia filo lastatempe tre interesiĝas pri bildlibroj, ofte postulas legadon (ne legadon en la vera senco de la vorto, sed montradon). Do la plej ofta frazo de mia flanko estas *Kio estas tio (ĉi)?*. Mi provis uzi ankaŭ vidbendon fame konatan *Mazi en Gondolando*. Sed ĝi ankoraŭ ne taŭgas por li konsiderante lian aĝon. Per tia procedo, nun mia filo scipovas dekojn da Esperantaj vortoj kaj eĉ kelkvortan frazon, ekz. *Aŭto ne 'stas ĉi tie* ("ne 'stas" estas kripligo de "ne estas"). Se temas pri kompleta frazo, kompreneble li parolas la japanan plej bone, sekvas la ĉina, kaj E-o lastavice, kion oni povas kompreni

laŭ tempolongeco de intertuŝo; nome kompare kun patrino kiu estas hejme, patro (mi) laborante tage ne povas sufiĉe ofte kontakti sian infanon.

Jen kelkaj problemoj:

a) Infanoj edukataj en pluraj lingvoj ofte intermiksas ilin. Ankaŭ mia filo ne estas escepto. (ekz. "dormo nai" t.e. "mi ne volas dormi": "nai" signifas "ne"). Sed tia intermikso estas ne pli ofta ol nia antaŭsupozo. Mi povas diri, ke li distingas tri lingvojn; nome kun la avo li parolas japane, kun la patrino ĉine, kun mi Esperante, kvankam ne perfekte.

b) diferenco de fonetika sistemo inter tri lingvoj malhelpas posedi aŭtentikan prononcon de la koncernaj lingvoj. Mia edzino rimarkis, ke lia ĉina lingvo estas iom japan-odora. Eble estante en Japanio en lian orelon enfluas nekontraŭstareble multnombraj japanaj vortoj, lian cerbon iom post iom ekregas japanlingva fonetika sistemo. Mi kiel nedenaska esperantisto, parolas E-on kun prononco inklina al la japana, sed klopodas prononci kiel eble plej ekzakte. Tio foje donas streĉon al mi.

c) Mia filo en certa kazo insiste rifuzas E-on. Al miaj demandoj ekz. "Kiom aĝa vi estas? Kio estas via nomo?" li persiste respondas "aĝa nai" "nomo nai". Ne grava, sed interesa fenomeno. Kialon mi ankoraŭ ne komprenas.

d) La plej grava problemo estas, ke al li mankas amikoj esperantistaj. En tiu ĉi mondo li konas nur unu esperantiston, nome sian paĉjon. Estonte povas ekesti konscio ĉe li, ke E-o estas tre speciala lingvaĉo, kiun amas nur paĉjo. Mi konas unu infanon, kiu edukite parte en E-o nomas ĝin "lingvo de paĉjo" kaj hezitas uzi ĝin antaŭ publiko eĉ en esperantista kunveno. Cetere mi konas denaskajn esperantistojn, kiuj en sia infaneco bone parolis E-on sed kun kresko iom post iom forgesis. Do la tuta problemo dependas de nuna edukado, kaj nepre dezirinda estas kunludanto esperantista (plenkreskulo ankaŭ bone).

*5) resumo*

Mia filo estas ankoraŭ nur 2-jaraĝa, do ne troviĝas sufiĉaj materialoj menciindaj. Sed laŭ ĝisnuna sperto mi kaptis iusence memfidon por eduki lin Esperante, kvankam mi komencis iom timeme. Instruo de E-o al propra infano ne bezonas speciale altan lingvokapablon, kiel oni supozas. Mi mem ne havante sufiĉan vortotrezoron, ĉiam renkontas okazon, ke mi ne scias kiel nomi koncernajn objektojn en E-o. Tiam mi serĉas alian esprimon kaj poste konsultas vortaron. Tio helpis riĉigon de mia E-o. "Instruo kreskigas ne nur instruaton sed ankaŭ instruanton". Tiu ĉi maksimo ankaŭ validas en mia kazo.

*Apendico*

Tiu ĉi manuskripto estis preparita por "la seminario de Donghua Esperanto-Domo en Ĉinio", kiu okazis la 11-13-an de julio, 1997. Mi mem ne ĉeestis, sed sendis retpoŝte mian manuskripton laŭ postulo de la organizanto. Poste mi ricevis rekomendon, ke ne nur mi sed ankaŭ mia edzino uzu E-on, kiam ni kunestas kun



la filo. Sed ni evitas tion, ne povas sekvi la rekomendon. Jam antaŭ lia naskiĝo ni diskutis pri divido de rolo rilate la lingvouzon. Nome, mi ĉiam parolu E-on antaŭ li, mia edzino ĉiam la ĉinan, sed inter ni la japanan, sed ne E-on. Tia divido estas absolute necesa por ne alporti konfuzon en lian cerbon. Sed kial ni uzas la japanan anstataŭ E-on? Du kialoj estas.

a) Mia edzino parolas E-on ne tre bone. Mi timas doni malperfektan lingvon (lingvaĉon) al li.

b) Kiel jam menciite, ĉi tie en Japanio la dominanta lingvo estas la japana. Se ni gepatroj ne uzus la japanan, tio estus kontraŭnatura ago. Li devos paroli la japanan ekster la familio. Ni ne volas, ke li fariĝu ridindaĵo kaj estu nomata strangulo fare de ĉirkaŭantoj. En Japanio bedaŭrinde troviĝas tendenco ekskludi heterogenan elementon malsame kiel en Eŭropo, kie diversaj elementoj nature kunekzistas.

*[Sur la foto: la familio de s-ro Yamaguti]*

*YAMAGUTI Sin'iti*
*Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, Nagoya-si, JP-468,*
*rete: syam-z@wa2.so-net.or.jp*

*YAMASAKI Seikô*

## Pri ekzamenoj de UEA/ILEI

Mi intencas, kiel direktoro de la komisiono de la Akademio pri landaj institutoj, fortigi la rilatojn kun ILEI kaj jam komenciĝis unuaj kontaktoj (tra s-ino Beloŝevič). Tiu ĉi eseeto estas mia persona penso, ne oficiala, por instigi diskuton.

Ŝajnas ke ekzamenoj en Esperantio estas subjektivaj. Oni pensas ke tion kaj tion kandidatoj al la elementa ŝtupo devas scii, sed kial? Oni ne povas klarigi la kialon al alia. Pli bone estus ke oni unue taksu ies nivelon per nombro, kiun oni povus uzi kiel unu el la bezonataj kondiĉoj por certa posteno, ekz. tiu de instruisto en elementa kurso. La poento mem estas neŭtrala kaj estas uzata por diversaj bezonoj. La tasko estas do starigi sistemon por taksado.

La tipa procedo estus jena:

Supozu, ke en iu ekzameno poentoj de la kandidatoj estas kompare pli malbonaj ol en la lasta. La preparintoj de la demandaro pensas ke tiu ĉi estis tro malfacila kaj decidas ke en la sekva fojo oni plifaciligu ĝin. La kialo tamen povas esti en la relative malalta nivelo de la kandidatoj. Oni analizas la cirkonstancon kaj konkludas ke ĉi tiu ekzameno okazis iom proksime al la lasta, en kiu multaj sukcesis, tiel ke restis por la ĵus okazinta relative malaltnivelaj ktp. Tiamaniere, oni ne povas precizigi kiom kontribuis la faktoro malfacileco kaj kiom tiu de la nivelo de la ekzamenatoj.

La idealo estas havi demandarojn ekzakte egale malfacilajn. Sub tiu kondiĉo, la sama persono gajnus la saman poenton, kiun ajn demandaron li trairas. Kiamaniere

oni povos atingi tiun celon? Oni facile povas atingi tiun rezulton uzante ununuran demandaron. Tio tamen havas fatalan difekton: ekzamenotoj tra la mondo studos ĝin tiel ke la efiko de studado nuligos la fidindecon de la testo.

Oni do devas elimini diferencon en malfacilo de sufiĉe granda nombro da demandaroj.

Se ni prenas averaĝan poenton (aritmetikan mezumon) de diversaj testoj, kaj se la populacio de la ekzamenatoj estas sufiĉe granda, iu gajninta la mezuman poenton, ni diru ekz. 50, gajnos la saman en aliaj demandaroj. Por mezuri la devion for de la mezumo, oni kutime uzas la normalan devion. Ni nomu la poenton rezultantan el tiu ĉi metodo provizore "devia valoro". Tiu metodo estas vaste uzata por abiturientaj testoj en multaj landoj, sed en Esperantio, ŝajnas ke eĉ tio ne estas praktikata.

La fina celo estas prepari kiom eble plej grandan nombron da demandaroj kun egala malfacilo, t.e. alĝustigi demandarojn tiel ke proksimiĝu unu al alia la aritmetikaj mezumoj de iliaj absolutaj poentoj kaj la normalaj devioj. Por tion fari, necesas tempo kaj peno. Maldetale, la ĝenerala konturo estus kiel sube montrata.

a) Unuigi la konsiston

Oni unue devus unuformigi la konsiston, aŭ strukturon (kiajn erojn havu la demandofolioj) de tutmondaj demandaroj, alivorte, unuecigi la konsiston kaj la kvantajn parametrojn de la demandoj, t.e. certa nombro da vort-rilataj demandoj, alia da sintaksaj, alia da aŭdkapablo ktp por faciligi la laboron de alĝustigo. Oni devus palpi la vojon, ripetante revizion dum la unua stadio, sed kiam unufoje ĝi estos tiel decidita, oni ne plu ŝanĝu la konsiston.

b) Poentodono per normala devio

Oni uzu saman demandaron multfoje, tiel pligrandigante la populacion. Nature, profitas tiuj kiuj havas informon pri certa demandaro elde tiuj kiuj jam subiris la saman. Ne estas konsilinde uzi saman demandaron en proksimaj regionoj, ekz. Eŭropo. Tiu ĉi maljusteco estas neevitebla en la unua stadio de nia laboro. Oni ne donu al la rezulto oficialan karakteron. Oni ne publikigu la demandarojn. Ĉiujn demandofoliojn oni reprenu. Oni ne publikigu ĝustajn respondojn. Se oni havas sufiĉe multajn demandarojn, oni povas redukti la efikon de studado.

c) Samniveligi la malfacilon de demandaroj Paralele kun b., oni provu c.

La celo: samgradigi iom post iom absolutajn poentojn de demandaroj diferencaj per substituo de unuopaj demandoj.

Oni anstataŭigas malfacilan demandon per pli facila, kaj inverse, en laŭgrada procedo. Oni elsarkas malfacilajn demandojn el demandaroj kun plej malaltaj averaĝoj kaj anstataŭas ilin per pli facilaj, elektitaj el demandaroj kun altaj averaĝoj. Dum tiu procezo oni ne timu havi samajn demandojn en multaj aroj.



Tiamaniere la tasko unugradigi malfacilon fariĝas multoble pli facila. Nome, kompare malgranda nombro da demandoj generas grandan nombron da demandaroj. Malmultigi diferencon de devioj estas pli malfacile, sed oni povas eviti tiun ĉi maltaŭgecon per la daŭrigado de uzo de deviaj valoroj.

Tio ĉi estas kion faris, proksimume, ETS (Servo de eduka testado), kiu plenumas ĉiun monaton ĉie en la mondo testojn pri la angla por kandidatoj al studado en usonaj universitatoj.

d) Buŝa ekzameno

Estas pli malfacile normigi buŝajn testojn ol skribajn. Ankaŭ ĉi tie, oni unue devus unugradigi, kiom eble plej, la konsistojn, atentante precipe ne enlasi etnakulturajn demandojn. Oni preparu multajn modelajn demandojn kun supozataj respondoj kaj pluaj disvolviĝoj de la konversacio.

Oni registru la interparolojn por ke la takso ne baziĝu sur momentaj impresoj de ekzamenantoj kaj ke, se eble, en estonto devige, povu taksi ankaŭ triapersonaj ekzamenantoj surbaze de la registraĵo. Tiujn registraĵojn oni kopiu kaj konservu kiel kriteriojn por unuformigi la poentojn ĉie en la mondo.

Mi ne proponas revizion de la aktuala ekzameno de ILEI, sed nur adopton de la supre eksplikitan, paralele kun la ekzistanta por certigi ties objektivecon.

*YAMASAKI Seikô*
syama@dokkyo.ac.jp

## Reago de la Internacia Ekzamena Komisiono
### al la artikolo de s-roYamasaki Seikô

La Internacia Ekzamena Komisiono verk(ig)as testojn por la elementa kaj meza niveloj de la UEA/ILEI-ekzamenoj sen iu atento pri la rezultoj de iu antaŭa ekzameno. Tiuj rezultoj do ne influas la prijuĝon de la malfacileco de testoj. Oni klopodas fari la testojn same (mal)facilaj.

Ĉiu ekzameno estas "subjektiva" en tiu senco, ke estas praktike ne eble verki testojn kiuj ĉiam estas objektive kompareblaj laŭ grado de malfacileco. Tion eble povus fari profesia, granda institucio, kiu disponas pri aro da bone pagataj scienculoj, sed por relative malgranda komunumo kiel Esperantio, tio ne estas atingebla. La nombro da kunlaborantoj, ekzamenantoj kaj ekzamenotoj estas tro malgranda.

Teorie s-ro Yamasaki povas pravi, praktike liaj ideoj estas ne realigeblaj. Por nia komunumo ili estas tro ambiciaj.

Diferenco inter la poentaroj de la kandidatoj en sinsekvaj ekzamenoj ne simple indikas, ke la testoj en iu ekzameno estas pli (mal)facilaj ol en alia. La nivelo de la kandidatoj povas signife diferenci.

La (malmultaj!) spertuloj pri kiuj la I.E.K. povas disponi kaj kiuj verkas la ekzamentestoj, sufiĉe konscias, ke la niveloj de la ekzamentestoj estu kiom eble plej kompareblaj.

*Nome de la Internacia Ekzamena Komisiono,*
***Hans ten Hagen, sekr.***

## Reago de s-ro Vaha al propra reago

1) Reage al mia artikolo Simplaj komplikaĵoj (IPR, 3/97, 15-6, 21-4) Johano Petik, en persona letero al mi, skribis, interalie: »Mi imagis nenian "subitan ŝanĝon" en lingvouzo... «. Mi do estis skribinta malprave (minimume) la sekvajn propoziciojn: "ŝajnas al mi, ke li [=Johano Petik] táksas tró ankaŭ la eblon de subita ŝanĝo en lingvouzo de tuta komunumo" (c.l., p.22).
2) Enkondukante mian supre menciitan artikolon, la Redakcio – troige – mencias min kiel konatan lingviston... Mi kompreneble konscias, ke nek konateco, nek havo de scienca titolo povas subteni erarajn asertojn, se ili estas eraraj. Mi simple – kiel pluraj aliaj – strebas esprimi miajn opiniojn. La ideoj de Johano Petik havigis al mi motivon, IPedRo lokon por esprimi min kaj mian starpunkton. Mi dankas ilin.

***Blazio Vaha***

**POR VIA NOTLIBRO**

## Konkurso kiu invadas Esperantujon


Laborkomisiono de ILEI pri Lernejaj Konkursoj antaŭ ok jaroj lanĉis sian konkurson por lernejanoj, kiu poste ricevis la koncizan nomon *poentokolekta*. Temas pri Internacia Konkurso honore al *István Szerdahelyi*. En 1994 ĝi larĝe malfermis siajn pordojn antaŭ plenkreskuloj kaj nuntempe konkursemaj e-istoj povas intermezuri siajn lingvajn kaj movadajn sciojn en tri kategorioj: *komencantoj, progresintoj, plenaĝuloj* kaj en du grupoj (escepte plenaĝulojn): *bazlernejanoj* kaj *mezlernejanoj*. Entute ekzistas do kvin konkursgrupoj.

Ĝojinde ke en la lasta lernojaro salte kreskis la nombro de la konkursantoj en la kategorio de plenaĝuloj. En la fino de la lernojaro ni havis konkursantojn el 23 landoj.

Sube mi informas pri la fina rezulto de la pasinta jaro. Vi trovas nur la nomojn de la unuaj tri personoj kies nomojn, cetere, Radio Aŭstria regule disaŭdigas post ĉiu turniro (ekzistas 7 turniroj, de oktobro ĝis aprilo po unu monate).

En la kategorio de KOMENCANTOJ:
*Bazlernejanoj*:
1. Gyöngyi Siffel, Pápa (Hungario), 135 poentoj *[ŝian foton vidu dekstre, supre]*
2. Maja Fišer, Zagrebo (Kroatio), 129 poentoj
3. Natalia Djeri, Zagrebo (Kroatio), 126 poentoj

*Mezlernejanoj*:
1. Iveta Réka, Miskolc (Hungario), 133,5 poentoj
2. Tímea Nyárádi, Miskolc (Hungario), 133 poentoj
3. Zeljka Betica, Zagrebo (Kroatio), 132,5 poentoj



En la kategorio de PROGRESINTOJ:
*Bazlernejanoj*:
1. Bernadeta Tóth, Kecskemét (Hungario), 137 poentoj
2. Valentina Čale, Zagrebo (Kroatio), 126,5 poentoj
3. Mirela Mezak, Zagrebo (Kroatio), 123,5 poentoj

*Mezlernejanoj*:
1. Eddy Derycke, Boulogne-sur-Mer (Francio), 141 poentoj
2. Tibor Szabó, Kecskemét (Hungario), 141 poentoj
3. Renata Szabó, Kecskemét (Hungario), 138 poentoj

En la kategorio de PLENKRESKULOJ:
1. Jindrich Tomísek, Ĉeĥio,141,5 poentoj
2. Monika Molnár, Hungario,140,5 poentoj
3. Janine Dumoulin, Francio,140 poentoj

Eble ne klare vidiĝas, laŭ la supra listo ke, dum la kategorion de la lernejanoj konsistigas hungaroj, kroatoj kaj francoj, en la kategorio de plenkreskuloj konkursas por la unuaj lokoj e-istoj el ne malpli ol dek diversaj nacioj, feliĉe.

En la nova lernojaro la Komisiono havas propran hejmpaĝon: **<http://w3.datanet.hu/~bjg/esperanto>** kie aperas ne nur la novaj taskoj, sed ankaŭ iliaj solvoj kaj la listoj de konkursantoj en diversaj kategorioj kaj grupoj. Ni esperas ke larĝigo de la ebloj plu altigos la nombron de la konkursantoj el la tuta mondo.

Ni arde deziras altiri la atenton de ĉiuj instruistoj kaj kursgvidantoj kaj aktivigi ĉiujn. Niaj argumentoj estas jenaj: la taskoj ne prenas de la konkursantoj multan tempon (ĉiu taskofolio enhavas entute 7-8 tasketojn, kies solvoj ampleksas ne pli ol duonpaĝon de la formato A/5); la korektitaj solvoj, kiujn ricevas ĉiu konkursanto, helpas la lingvan progreson; regula partopreno en konkursema kolektivo elformas la senton de aparteneco; kaj la partopreno kostas nur kelkajn groŝojn, tamen oni povas gajni jarabonon al revuo, senpagan partoprenon en IJS (mezlernejanoj).

Mi rekomendas al ĉiu mediti iom, ke ĉe ekzisto de tia ebleco, ĉu ne estus oportune amase partopreni aŭ partoprenigi niajn kursanojn, la praktikaj ebloj ĉe ni, en Esperantujo ĉiam ankoraŭ estas ja mizeraj kompare al la mondlingvoj instruataj en la lernejoj.

***Géza Kurucz, komisionestro***

# Konkurso de infandesegnaĵoj

La internacia konkurso de infanaj desegnaĵoj *Pasinto, nuno kaj estonto en la infana kreado* estos efektivigata la duan fojon. En la unua (1993-94) partoprenis cirkaŭ 7000 infanoj el 25 landoj de la mondo. Temo de la konkurso ekscitis la vivan intereson de la partoprenintoj. La verkoj estis diverstemaj, profundenhavaj kaj en multaj rilatoj neatenditaj por la organizintoj. La verkoj montris, ke la proponita temo pripensigis infanojn kaj iliajn pedagogojn pri la plej akraj vivproblemoj de homoj. Tio konvinkis la fondintojn de la konkurso pri pravigiteco de ĝia regula aranĝo kaj pri restigo de ĝia devizo.

*Kondiĉoj de la konkurso*: De ĉiu partoprenonto estos akceptataj tri verkoj - ĉiu laŭ unu el la temoj de la konkurso (triptiko) aŭ unu verko laŭ ĉiuj tri temoj (monotriptiko). La aŭtoro povas laŭdezire limigi sin je unu verko laŭ unu el la temoj - ekzemple, "Estonto". La aŭtoro povas rakonti pri eventoj en sia loĝloko kaj pri iliaj eblaj sekvoj en estonto, pri la naturaj, historiaj aŭ arkitekturaj vidindaĵoj de sia landparto. Temas pri historio de unu homo aŭ familio, urbo, popolo, lando, planedo. En la konkurso povas partopreni infanoj kaj adoleskuloj ĝis 17 jaroj.

*Plenumado de la verkoj:* La verkoj povas esti plenumataj per ajna teknikrimedo: akvofarbo, guaŝo, tuĉo, krajono, gravuro ktp. kun dimensio de 30x30 cm ĝis 40x60 cm, sen kadroj kaj paspartuo. Dorsflanke de ĉiu verko estas necesa surskribo aŭ etikedo kun familinomo, nomo, aĝo kaj adreso de la aŭtoro, titolo kaj temo de la verko. Ni petas alsendi ankaŭ respondojn al la demandaro.

*Rezultoj de la konkurso:* La verkoj estos pritraktataj triturne, aparte laŭ la branĉoj *Triptikoj, Monotriptikoj, Pasinto, Nuno, Estonto* en ĉiu aĝgrupo (ĝis 7, 8-10, 11-12, 13-14, 15-17-jaruloj). En la unua turno la verkoj estos pritraktataj ĝis marto 1998, en la dua - ĝis junio 1998, en la tria - ĝis novembro 1998. La jurio evidentigos laŭreatojn, diplomitojn "*Espero de Estonto*", medalulojn, kiuj estos honorataj per respektivaj premioj, diplomoj, medaloj. Al la aŭtoro de la plej bona verko, sendepende de la aĝgrupo kaj verkobranĉo, estos aljuĝita *La Granda Premio* de la konkurso. Estos fondataj ankaŭ specialaj premioj, inkluzive Premion de la urbestro de *Elektrostal*. La oraj premiitoj de la konkurso estos invitataj kun siaj pedagogoj al *Elektrostal* por la solena ceremonio de enmanigo de la rekompencoj. Estos invititaj ankaŭ la diplomitoj de la konkurso laŭ rekomendo de ĝiaj jurio kaj fondintoj. Ĉiuj organizoj, sendintaj al la konkurso la verkojn, ricevos diplomojn "*Partopreninto de la konkurso*" kaj informojn pri ĝiaj rezultoj. Al dezirontoj korespondi kun samaĝuloj ni helpos interŝanĝi adresojn. La jurio ne publikigas motivojn de siaj decidoj kaj ne korespondas ĉi-koncerne. La materialoj, alsenditaj al la konkurso, ne estos resenditaj, konsistigante fondusojn de la konkurso. La plej interesaj verkoj formos migrajn



ekspoziciojn en *Elektrostal*, Moskvo kaj aliaj urboj kaj landoj, alsendintaj siajn antaŭmendojn por eksponado de la verkoj.

*Prezento de la verkoj:* La verkoj devas esti alsenditaj ĝis la 31-a de decembro 1997. La verkojn sendu laŭ jena adreso: *Muzeo-ekspozicia centro, Raskovoj - 37, RU-144003 Moskva-Elektrostal, Rusio.*

La verkojn necesas alsendi letere aŭ banderole. *Elektrostalaj* telefonoj 446-61, 424-72. Prefikso el Moskvo kaj Moskva regiono - (257), el aliaj urboj - (09657). E-poŝto: era@glasnet.ru.

Demandaro de la konkurs-partoprenanto *(sendu ĝin kune kun viaj verkoj)*
La titolo de la verko _____
La titolo de la verko pri Pasinto _____
La titolo de la verko pri Nuno _____
La titolo de la verko pri Estonto _____
Pri la aŭtoro de la verko: Familinomo, nomo _____
Aĝo _____ Sekso _____
Adreso hejma aŭ de la organizo, alsendinta la verko(j)n, kun ĝia nomo
_____
Familinomo, nomo de la pedagogo _____
Telefono _____ Prefikso de la urbo_____
Aldono: laŭdezire vi povas respondi jenajn demandojn: - Kial vi elektis vian temon? - Kion vi volus rakonti pri via pedagogo? - Ĉu vi volas korespondi kun viaj samaĝuloj, en kiu lingvo? - Bv. sendi viajn salutojn kaj dezirojn al viaj samaĝuloj.

---

*Alvoko por internacia konkurso pri*

## Modela Esperanto-parolo, honore al Ivo Lapenna

*(Lernojaro 1997/98)*

Por etendi al E-o la tradicion de pluraj landoj, ni organizas la 6-an Internacian Konkurson, ĉi-foje por lernejanoj de 11 ĝis 15 jaroj. Per la konkurso ni intencas turni atenton al bela, modela, por ĉiu klara kaj komprenebla parolo en E-o. La plej bona konkursantoj estos distingataj per honora diplomo IVO LAPENNA.

Ĉiu aliĝinto prezentos libere elektitan tekston ne pli longan ol 20 tajpitajn liniojn. La instruisto jurios siajn lernantojn kaj sendos la plej talentajn (ne pli ol du personojn) al regiona konkurso, kie la konkursantoj denove prezentos siajn tekstojn kaj tuj poste nekonatan, ricevitan samloke.

La voĉoj estos registrataj en iu sonizola studio kaj la registraĵoj estos ĵuriataj de tri kompetentaj personoj apartenantaj al tri diversaj lingvofamilioj. Ĉiu el ili poentumos (de 0 ĝis 10) ĉiun registraĵon ne konante la pritaksajn notojn de la ceteraj ĵurianoj.

*Ĉe juriado estos konsiderataj:*

a) klara kaj regula prononco de ĉiuj sonoj, silaboj
b) ĝustaj akcentado kaj intonado
c) ritmo kaj laŭsenca disigo de penselementoj.

Aliĝo ĉe la propra instruisto ĝis la 23-a de decembro 1997. Loka konkurso: en januaro 1998. Regionaj konkursoj: ĝis la 20-a de februaro 1998.

*Atentu*: la konkursaĵoj devas atingi la adreson de la organizanto antaŭ la 15-a de marto 1998. Ĵuriado: en marto 1998. Prezento de la distingitoj: ĝis la 15-a de majo 1998.

Ĉiuj instruistoj, kies lernantoj deziras partopreni en la konkurso, informu la organizanton, *s-ro Ivan Bekavac-Basiĉ* ĝis la 6-a de januaro 1998:

*ILEI-Komisiono pri Lernejaj Konkursoj, Ivan Bekavac-Basiĉ Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Rete: mbelosev@public.srce.hr*

## NI KONDOLENCAS

En la septembra numero ni aperigis alvokon de Enrique Kohei pri "Infanoj en la mondo". Bedaŭrinde, Enrique Kohei (1921-1997), UEA-membro de 1945 kaj pli ol 40 jarojn delegito (pri instruado kaj informado), mortis meze de septembro en Venado Tuerto (Argentino). E-isto ekde la 41/42-aj jaroj, Kohei agadis kiel komitatano de *Argentina E-Ligo*, dum pluraj jaroj redaktis ties organon *Argentina Esperantisto*, organizis multajn ekspoziciojn kaj funkciis kiel la argentina peranto de *El Popola Ĉinio*.

Li aŭtoris la baznivelan lernilon *Ne krokodilu plu...!*, instruis E-on en la Universitato de Rosario kaj gvidis multajn E-kursojn diversloke. Eĉ malsana, en siaj lastaj vivmonatoj li aktivis por la projekto "Infanoj en la mondo".

***Rodolfo G. Calógero***

## APERIS LA DUA KAJERO DE TENDARAJ TAGOJ!



En nia antaŭa numero vi trovis varbilon por Juna amiko, kiu krome anoncis la revizion de tiu lernolibro de ILEI. Post duonjara laboro, ĝi nun aperis kaj estas aĉetebla. Ĝi havas grandajn ŝanĝojn kompare al la unua eldono, ne malplej dudek pliajn paĝojn kaj presado per kvar koloroj anstataŭ nur unu. Bildoj kiel antaŭe de Pavel Rak (vidu dekstre, kiel tendarano Habibo trafe ĵonglas - unu telero ĵus trafis alian).

La specialaj prezoj anoncitaj por diversaj libroj ĝis la 30-a de novembro 97 plue validos ĝis la 20-a de decembro. Bonvolu subteni la ligan libroservon, rerigardu nian mendilon kaj sendu mendojn




antaŭ tiu limdato, ĉar jarfine nia afranko altiĝos signife.

Unu ekzemplero de TT2 (inkl. sendokostoj):15 NLG, ekde 3 ekz., po 11 NLG, ekde 9, po 8 NLG. Mendu ĉe ILEI, pf. 193, HU-1368 Budapest. Mendebla ankaŭ ĉe UEA.

*smg*

## Abonu la revuon Eventoj

La plej ofta kaj populara sendependa gazeto EVENTOJ kun aparta ILEI-rubriko staras je la dispono ankaŭ de E-instruistoj. Baza abonkotizo de la dusemajna gazeto estas 74 guldenoj (per aerpoŝta sendo: 86 NLG) pagebla ĉe UEA aŭ ĉ. 30 landaj perantoj. Ekssoclandanoj havas speciale rabatitan abonkotizon. Petu ĝin kun senpaga provekzemplero ĉe la redakcio: *pk. 87. HU-1675 Budapest, Hungario.* Ekde januaro startas ankaŭ rEt-VENTOJ, kiu estas interreta novaĵservo pri movadaj aferoj (la ĉefaj materialoj de Interredaktore, retpoŝta versio de Eventoj, multaj aliaj artikoloj ktp). Abonkotizo nur 45 guldenoj (B-landanoj: 25 guldenoj) - do krom "esti informita" vi povas ankaŭ signife ŝpari... Kontaktu: *eventoj@hungary.net*



→ *[**Ago-Tago**: ni devus postuli ankaŭ la malaltigon de la abonkotizo por Eventoj]*

## GRANDA ŜANCO POR ESPERANTO

dum prestiĝa lingvistika konferenco

Inter la 16-a kaj 18-a de aprilo 1998 okazos en Szombathely (Hungario) la VIII-a Konferenco de Aplikata Lingvistiko. La konferencon organizos la nova universitata katedro de nia pedagogia altlernejo, ĝia ĉeftemo estas: *La lingvo kiel intelekta kaj ekonomia kapitalo.*

Estante unu el la ĉeforganizantoj mi sukcesis atingi dum la unua preparkunsido, ke ankaŭ interlingvistiko kaj esperantologio aperu inter la sekcioj. La prestiĝaj lingvistoj kvankam iom skeptike pri la manko de vera intereso rilate tiun temon, fine tamen komisiis al mi prepari kaj gvidi la tiean laboron. La konferencon partoprenos ĉ. 300-400 en- kaj eksterlandaj lingvistoj kaj lingvoinstruistoj, reprezentiĝos kaj prelegos ankaŭ la kulturministro kaj aliaj respondeculoj de la ministerio. La laboro disvolviĝos en 18 sekcioj, ni antaŭvidas ĉ. 200 prelegojn

kaj rondtablajn diskutojn. La materialo de la konferenco aperos ankaŭ libroforme. Gravaj eldonejoj kaj lingvolernejoj havos ekspozicieblojn.

Povas esti esperodona paŝo la nuna eblo por ni ĉiuj. Se la nova sekcio sukcesos, ĝi havos eblon ankaŭ sekvontjare eniri la programon. La informdonaj kaj sciencaj prelegoj povas okazi ankaŭ en Esperanto (kun paralele sekvebla skriba traduko al la hungara). Miaimage la prelegoj ne estu altrude propagandaj, movadece varbaj. Ili estu lingvistike konvinkaj, ĉu ĝenerale pri interlingvistikaj demandoj, ĉu pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj.

La laborlingvo povas esti ne nur la hungara (kial ne Esperanto?) ankaŭ en la aliaj sekcioj (interkultura komunikado kaj la demandoj de Eŭropa Unio, sociolingvistiko, lingvaj rajtoj, komputilo kaj lingvistiko, psikolingvistiko, dukaj plurlingveco, specialaj komunikproblemoj, aplikata lingvistiko kaj la surdeco, kontrast-lingvistiko, traduko-interpretado, faklingvo, lingvopedagogio, historio de la lingvoinstruado, aplikata tesktolingvistiko, aplikata lingvistiko en la gepatralingva edukado, la hungara kiel fremda lingvo, entreprena/komerca komunikado).

*La definitiva aliĝdato por la prelegontoj estas la 15a de januaro 1998.*
*Por pli detalaj informoj kaj konsiloj turnu vin al d-ino Katalin Smidéliusz, HU-9701 Szombathely, BDFT, Alkalmazott Nyelvészeti Tanszék, Pf.: 170. Hungario.*
*Universitata Fakso:+36-94-312-248.*
*Prefere uzu la retadreson: smidik@rik.bdtf.hu.*

**Kompetentaj lingvistoj, kolegoj, helpu al ni ne perdi tiun ĉi okazon!**

***Katalin Smidéliusz***

## INSTRUTREJNA SEMINARIO DE ILEI SOMERE DE 1998

Antaŭ la Universala Kongreso ILEI okazigos en Francio dusemajnan pedagogian seminarion por trejni personojn kiuj deziras plispertiĝi pri la instruado de Esperanto. Ĝi okazos kadre de la programo de la Esperantista Kulturdomo Gresillon inter la 20-a kaj la 31-a de julio.

Ĉefinstruistoj estos d-ro Duncan Charters kaj d-rino Katalin Smidéliusz. Estos eble aliĝi por la du semajnoj aŭ nur la dua.

Pliaj detaloj en la sekvaj numeroj de IPR.

***Duncan Charters***



**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

*Esperanto – internacia lingvo*

**32ª ILEI-Konferenco**
**8ª-14ª aŭgusto 1998**
**Montpellier – Francio**
**Temo:**
**Lingvoinstruado, ponto al la mondo**
**Konferenca numero:**

Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon, fotokopion aŭ samformatan paperon. Bv tajpi aŭ skribi preslitere.

FAMILIA NOMO ..... VIRO/VIRINO
(por alfabeta ordigo) (forstreku unu)
PERSONA(J) NOMO(J) .....
ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo) .....
.....
LANDO..... TEL Nº (kun prefikso) .....
PROFESIO/FAKO .....

Mi aliĝas al la Konferenco laŭ la kondiĉoj presitaj sur la sekvaj paĝoj kaj pagas al la ILEI-Kasisto:
**Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn de ĉi tiu aliĝilo.**

DATO..... SUBSKRIBO.....

KOTIZO (vd. sekvan paĝon) .....
KONFERENCA KASO .....
KOLEGHELPA KASO .....
BANKKOSTOJ .....
ENTUTE (en guldenoj) .....

Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu ILEI jam havas atestilon? *jes/mi kunsendas* (forstreku unu)

**La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ jena grupiĝo:**

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B

B: iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latinameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la ILEI-Kasisto laŭ jenaj vojoj:

a) al ILEI-konto ĉe UEA: ilek-a, indikante: „ILEI-Konferenco";

b) al poŝtĝirkonto Nº 68 21 17-7, ILEI, Södra Rörum pl 455, SE-242 94 Hörby, Svedio. Bv aldoni NLG 10,00 por bankaj kostoj;

c) per via banka konto al la antaŭa adreso. Bv aldoni NLG 10,00 por bankaj kostoj.

## Por elekti la ĝustan kotizon, bonvolu atente legi la sekvajn klarigojn:

| Kotizoj validaj | ĝis 98 03 31 1-a periodo | | ĝis 98 06 30 2-a periodo | | ekde 98 07 01 3-a periodo | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Aliĝkategorio | A | B | A | B | A | B |
| 1. Membro de ILEI | 30 | 25 | 36 | 30 | 42 | 35 |
| 2. Ne ILEI-ano | 38 | 32 | 46 | 39 | 54 | 45 |
| 3. Gimnazia instruisto, junulo, handikapulo | 24 | 20 | 29 | 24 | 34 | 28 |

*(La prezoj estas indikitaj en nederlandaj guldenoj!)*

**Kotizoj por loĝado + matenmanĝo:**
En ĉambro *kun* necesejo kaj duŝejo (limigita nombro):
*dulitaj (6) kaj trilitaj (2): 265 NLG*
En ĉambro *kun komunaj* necesejo kaj duŝejo:
*Unulita ĉambro: 225 NLG*
*Dulita ĉambro: 215 NLG*

**Manĝoj:**
Surloke eblas manĝi, sed vi devas mendi ĝin plej malfrue ĝis la 31-a de majo 1998. Post tiu dato ne plu eblas mendi manĝojn. La loĝprezo ne inkluzivas tag-, kaj vespermanĝon, nur la matenmanĝon. La nunaj prezoj (ŝanĝoj povas okazi, do, bv. legi informojn en venontaj numeroj de IPR):

*Tagmanĝo: ĉ. 19 NLG aŭ 55 FRF*
*Vespermanĝo: ĉ. 17 NLG aŭ 50 FRF*

La manĝoj estos pagendaj surloke.

_____ *Mi mendas ĉambron (propraj necesejo kaj duŝejo) dulitan / trilitan*
_____ *Mi mendas ĉambron (komunaj necesejo kaj duŝejo) unulitan / dulitan*
_____ *Mi antaŭmendas tagmanĝon.*
_____ *Mi antaŭmendas vespermanĝon.*
_____ *Mi estas vegetarano.*
_____ *Mi havas dieton, nome.....*
_____ *Mi deziras loĝi kune kun.....*
_____ *Mi antaŭmendas tuttagan ekskurson (aparte pagenda).*

*Pagon de ..... mi faris al ..... en valuto .....*

**DIFINOJ**
***Membro de ILEI:*** tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco
***Gimnazia instruisto***: tiu, kiu instruas kadre de ILEI-Gimnazio dum la Konferenco
***Junulo:*** tiu, kiu naskiĝis post 68 01 01 inkluzive



**La kotizo ne estas repagebla**, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Konferencon pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Konferenco ne okazas aŭ okazas en alia urbo.
**La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn kaj eventuale aparte pagendajn aferojn, pri kiuj informoj kaj mendiloj aperos en IPR. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.**
**Konferencaneco ne estas transdonebla** al alia persono.
**Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago ĉe la ILEI-Kasisto. Aliĝilo sen kompleta pago ne estas traktata.**

**Konferenca Regularo (ekstrakto):**
6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. [...]
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.

* * *

## FINANCA RAPORTO DE ILEI POR LA JARO 1996

| RIMEDOJ | SEK | KOSTOJ | SEK |
|---|---|---|---|
| membrokotizoj | 53.981:48 | IPR | 55.737:37 |
| libroj | 879:32 | afranko | 8.940:60 |
| eldono profito | 4.220:99 | estraraj kostoj | 5.869:01 |
| subvencio de UEA | 11.860:50 | kopiado, materialo | 7.959:25 |
| ekzamenoj | 7:10 | faka kotizo | 1.150:47 |
| interezo | 2.984:28 | bankkostoj | 1.495:00 |
| Koleghelpa kaso* | 1.675:73 | gazetoj (JA) | 5.255:81 |
| Konferenco '96 | 3.887:03 | Koleghelpa konto | 1.738:00 |
| | | oficejaj iloj | 2.485:88 |
| | | honorarioj | 491:24 |
| | | UK | 782:79 |
| | | Azia agado | 995:46 |
| Malgajno | 13.929:95 | eksteraj rilatoj | 525:50 |
| **Sume:** | **93.426:38** | **Sume:** | **93.426:38** |

| AKTIVO | SEK | PASIVO | SEK |
|---|---|---|---|
| en kaso | 183:78 | Koleghelpa konto | 5:58 |
| banko SE | 38.223:42 | kreditoroj: | |
| Färs&Frosta | 1.868:42 | Fondajo Szerdahelyi | 919:39 |
| Poŝto | 3.586:78 | FEL | 32.570:67 |
| UEA, ilek-a | 61.779:53 | privatulo | 10.435:80 |
| Konf.97 (antaŭpago) | 10.285:80 | bonhava | 4.864:50 |
| ĉe sekcioj k.s. | 3.000:00 | | |
| debitoro | 1.120:53 | | » |

| AKTIVO | SEK | PASIVO | SEK |
|---|---|---|---|
| librostoko | 11.500:00 | | |
| nepagitaj fakturoj | 3.000:00 | | |
| oficejaj aĵoj | 5.000:00 | | |
| filetalaĵoj | 1:00 | propra kapitalo | 90.753:32 |
| **sume:** | **139.549:26** | **sume:** | **139.549:26** |

| **Koleghelpa konto** | | **Fondaĵo Szerdahelyi** | |
|---|---|---|---|
| saldo 1995.12.31 | 67:85 | saldo 1995.12.31. | 12.397:35 |
| donacoj | 1.675:73 | repago de prunto | 429:84 |
| membrokotizoj | -1.738:00 | aŭkcio (Tábor) | 483:50 |
| **saldo 1996.12.31.** | 5:58 | interezo | 420:20 |
| | | **saldo 1996.12.31.** | 13.730:89 |

| **Fonduso Erika Linz** | | | |
|---|---|---|---|
| saldo 1995.12.31. | 139.796:70 | interezo | 8.505:60 |
| stipendioj | -8.846:00 | Plivaloriĝo de obligacio | 3.600:00 |
| | | **Saldo 1996.12.31.** | **143.056:30** |

## FINANCA PLANO DE ILEI POR LA JARO 1998

| RIMEDOJ | SEK | KOSTOJ | SEK |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj | 59.200:- | IPR | 50.000:- |
| Libroj | 1.000:- | Afranko, telefono | 10.000:- |
| Konferenco | 3.000:- | Estraraj kostoj | 11.000:- |
| Koleghelpa kaso | 1.000:- | Fotokop., materialoj | 3.500:- |
| Fondaĵo Szerdahelyi | 1.000:- | Honorarioj | 2.000:- |
| Subvencio UEA | 12.000:- | Bankkostoj | 1.000:- |
| Eldonado | 5.000:- | Oficejaj iloj | 5.000:- |
| Ekzamenoj | 1.000:- | Kotizo UEA | 1.200:- |
| Interezoj | 2.000:- | UK | 500:- |
| Donacoj | 2.000:- | Azia agado | 1.000:- |
| Diversaĵoj | 2.000:- | Eksteraj rilatoj | 1.500:- |
| | | Reprezentado | 2.500:- |
| **Sume:** | **89.200:-** | **Sume:** | **89.200:-** |

*Bertil Andreasson, kasisto de ILEI*

### POSTPAROLO

La nunan numeron mi sendis al la presejo la 3-an de novembro. Redaktofino por la unua sekvajara numero: la 31-a de decembro. Lastajn korektojn mi akceptos ĝis la 15-a de januaro 1998. Danke al pluraj ILEI-anoj, nia IPR-arkivo preskaŭ kompletiĝis. Mankas nur la ekzemplero 1/80. Se vi povas, bv. helpi.

*Jozefo Németh, redaktoro*



## SEKCIESTROJ de ILEI

**Albanio:** Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
**Argentino:** Teresita Alaníz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal
**Aŭstralio:** Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122
**Aŭstrio:** Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien
**Belgio:** Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende
**Brazilo:** Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)
**Britio:** Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
**Ĉeĥio:** Jana Melichárková, Ratíškovice 938, CZ-696 02
**Ĉinio:** Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
**Finnlando:** S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
**Francio:** Fernand Micoud, 8 rue des Maures, FR-69320 Feyzin
**Germanio:** Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn
**Hungario:** József Németh, Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa
**Italio:** Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma
**Japanio:** Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, 181 Japan
**Kroatio:** Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59. HR-10000 Zagreb
**Kubo:** H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana
**Nederlando:** Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard
**Norvegio:** Björn Thuv, Aröyveien 33, NO-3135 Torod
**Rumanio:** Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
**Rusio:** Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
**Svedio:** Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
**Svislando:** François Randin, Str. Vallombreuse 14, CH-1004 Lausanne
**Usono:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono

## REPREZENTANTOJ de ILEI

**Armenio:** Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan
**Bharato:** Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal
**Bosnio kaj Hercegovino:** Nimeta Kulenović, Branilaca grada 17/V, BIH-71000 Sarajevo
**Bulgario:** Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
**Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, Séptima Región
**Danio:** Wolfgang Kirschstein, Hvedebjergvej 30, DK-8220 Brabrand
**Estonio:** Eve Otse, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn
**Hispanio:** Pedro M. Martin Burutxaga, Ctra. Estació 2 A-5-2, ES-17300 Blanes (Katalunio)
**Irano:** Hamzeh Ŝafii, P.O. kesto 13445-915, Teheran
**Islando:** Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur
**Israelo:** Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
**Jugoslavio:** Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak
**Kostariko:** Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603, CR-1000 San José
**Koreio:** So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
**Litovio:** Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
**Nov-Zelando:** Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
**Pollando:** Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7m. 122, PL-30150 Krakow
**Portugalio:** João Jose Santos Rua da Escola, lote 57 - r/c esq. Vale Grande PT-1675 Pontinha
**Sanmarino:** Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, SM-43031 San Marino.
**Slovakio:** Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
**Slovenio:** Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana
**Tanzanio:** Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara
**Togolando:** Afantchao-B.Yao, B.P. 20225 Lome
**Ukrainio:** Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev
**Uzbekistano:** Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS
**Venezuelo:** Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A
**Zairio:** Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

## LABORKOMISIONOJ

**Didaktikaj ludoj:** Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05

**Eksteraj rilatoj:** Raymond Wyllemann - Belgio (prezidanto), Marija Beloševiĉ - Kroatio, Marcel Delforge - Belgio, Ronald Glossop - Usono, Mireille Grosjean - Svislando, Francois Lo Jacomo - Francio, Bruno Masala - Francio

**Ekzamenoj:** prez.: Mag. Atilio Orellana Rojas (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: Hans ten Hagen, (adreso, kovrilo 3)

**Elekto komisiono:** Agneta Emanuelsson - Svedio, Doroteo Holland - Usono, Gwenda Suttun - NovZelando

**Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj:** Raymond Wylleman

**Gazetara servo kaj informado:** *vakas sed pretas kunlabori:*
Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29

**Konkursoj lernejaj:** Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario

**Lerneja kontaktigo kaj statistikado:** Provizore plenumata pere de *Juna amiko*

**Statuto:** Rob Moerbeek kaj Hans ten Hagen

**Terminologio:** Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**IEI:** Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

**UEA:** Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

## MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto.

**Kasisto de ILEI:** *Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo).* Membrokotizoj: NLG 22 por landoj en A-kategorio, NLG 20 por landoj en B-kategorio (laŭ UEA-divido). Simpla abono sen membreco (por E-societoj, bibliotekoj k.s.): 30 NLG. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita EuroĉEko plej bonas.

Alia pagmaniero estas al UEA: **UEA**, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

## KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Retadreso de la redaktoro: nlalt@konyvtar.c3.hu. Retadreso de la vicredaktoro: smidik@rik.bdtf.hu. Ili ambaŭ povas akcepti ankaŭ faksojn per komputilo, sed avertu ilin telefone antaŭ ol vi faksas. Telefon- kaj faksnumeroj: (+36-89) 315-836 (red.) kaj (+36-94) 320313 (vicred.). Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenas.

Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.